


Turka Stelo



SALUTON,

La pandemio furoras kaj estas granda batalo por la vakcinoj. Ni certe estas en nova ondo, kiu ankoraŭ grimpas supren. En Turkujo ĉiutage estas 50 mil novaj kazoj kaj mortas averaĝe pli ol 300 homoj. Ni aŭdas novaĵojn pri kiom da junuloj nun troviĝas en la malsanulejoj. Oni diras, ke la averaĝa aĝo de tiuj en la malsanulejoj jam malaltiĝis al la aĝo 50. Maljunuloj nun ne troviĝas tiom multe kiel pasintjare en malsanulejoj. **Ĉu pro la vakcino ĉu pro la mutaciaj virusoj kiuj nun trafas pli kaj pli la junulojn.**

Sed tamen ĉiuj kritikis la vakcinojn. Ĉiuj ja pravus ĉar ni aŭdas malagrablajn novaĵojn pri la vakciniĝintoj. Ĉio dum ĉi-tiu pandemio estas nova por ni kaj tiel estas ankaŭ la vakcinoj, kiujn oni pretigis haste. Sed kion alian ni havas por protekti nin, krom tiuj vakcinoj? La plej grava armilo estas vakciniĝi, daŭre porti maskon kaj atendi la socian distancon.

Jen, en via mano estas nia maja numero, kiu helpos eble teni vin en via domo kaj protekti vin de la viruso.

En ĉi tiu numero ni provizas interesajn artikolojn por ĉiuj. Ĉiuj tekstoj estas interesaj sed eble la plej interesa estas la scienca artikolo de Frank Van Hertrooij, kiu rakontas pri "La Historio de Genetiko". Aliaj tekstoj el diversaj partoj de nia mondo troviĝas en la maja numero de nia revuo.

Artikoloj el Bulgario, Turkio, Grekio, Islando, Ĉinio, Germanio, Kubo, Rusio, Francio, Albanio, Malto, Serbio, Litovio, Nederlando, Hungario, Ĉeĥio! Kaj multaj aliaj...

Dankon al ĉiuj de niaj kontribuantoj....

Bonan legadon al ĉiuj !

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Unesko-enketo en Esperanto	2
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Venelin Mitev foriris malrapide sub la pluvo	4
Ciklo kun Hori Jasuo	4
Tempo Sigelita	5
PELOPSO (ΠΕΛΟΨ)	6
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	8
El la libro de "Dao de Jing"	10
La Kimero - Rakonto el la estonteco (12)	10
El la literaturaj paĝoj de MAS	11
Kaftano de Trishko	12
Katoj kaj humanismo	13
Elstara Kosova muzikisto	3
La Trajno	14
Antaŭurba Lageto (1991)	15
Mirinda renkonto (7/10)	16
Ŝercoj	17
Krucvortenigmo	17
Sindonemo	18
La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj (1)	12
Mi prezentas	21
La Blanka Simio	21
Mia revolucio	24
La historio de genetiko	25
Mortigaj Poŝtmarkoj	31
Solvo de la krucvortenigmo	31
Facilaj rakontoj	32

Kursoj



En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj. Pro la kronviruso kaj kvaranteno estas neniu ebleco aktivi pri Esperanto lingvo.

Ekde la 22-a de novembro ni komencis serion de retaj kursetoj, ĉiu 30 minutojn longa, ĉiusemajnaj, pere de google.meet, pri diversaj gramatikaj punktoj de Esperanto. Temoj kaj iliaj planitaj datoj estas la jenaj:

- 22/11 Akuzativo
- 29/11 Transitiveco
- 06/12 Participloj
- 13/12 Korelativoj
- 20/12 Prepozicioj
- 27/12 Sufiksoj
- 03/01 Refleksiva pronomo: Si

<https://edukado.net/kursejo?kid=27268>

Unesko-enketo en Esperanto

Dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis disvastigi la informon pri la Unesko-enketo pri "**Voĉdono pri la ĉefaj defioj kaj celoj de edukado**" en Esperanto. La zorgantoj pri la enketo en Unesko estas kontentaj pri la ĝisnunaj rezultoj. Ĝis nun, la 21-a de aprilo, entute 2015 esperantistoj plenskribis la enketilon el ĉiuj mondopartoj. Sed ni ne estas kontentaj pri la rezultoj. Ni [tio estas la vic-prezidanto de UEA, Trezoro, kaj mi] volas atingi minimume 5000 respondojn.

Pro tio ni pluinformas pri la enketo, kiu estas trovebla ĉe <https://en.unesco.org/futuresofeducation/top-3-challenges-and-purposes-education/Esperanto> kaj ni petas vin helpi instigi esperantistojn en viaj landoj kaj urboj respondi la enketon.

Dankon pro tio, kion vi faris kaj faros.

Amike,
Renato Corsetti



Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



La 68-a Internacia Esperanto-Sumoo okazis ekde la 14-a ĝis la 28-a de marto 2021

Analizo

1. Partoprenantoj: 361 el 33 landoj+ unu regiono
2. La tuta nombro de partoprenantoj ekde septembro 2009 ĝis nun 13.991 homoj (2009.9-2021.3)
3. Laŭlandaj nombroj :
 - 1. Japanio: 67
 - 2. Francio: 44
 - 3. Ĉinio: 36 + Tajvano: 4
 - 4. Brazilo: 31
 - 5. Koreio: 25
 - 6. Germanio: 20
 - 7. Pollando: 17
 - 8. Rusio: 15
 - 9. Italio: 14
 - 10. Svisujo: 11
 -
3. Perfektaj venkintoj (15 venkoj): 332 el 361 (91,97%)
4. Kvanto de legitaj paĝoj: 20172 paĝoj

Nia retejo:
<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:
https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:
<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

UEA



N-ro 946 (2021-04-24)
Por 300 000 artikoloj en Vikipedio ĝis julio 2021
[...]

N-ro 945 (2021-04-20)
Komenciĝis simpozio kunorganizita de la Studgrupo pri Lingvoj kaj UN kaj la Universitato Princeton: pli ol 700 homoj jam aliĝis
[...]

N-ro 944 (2021-04-13)
La 53-a Malferma Tago okazos virtuale la 17-an de aprilo partnere kun Vinilkosmo
[...]

N-ro 943 (2021-04-10)
Unesko unuafoje faras enketon per Esperanto - UEA alvokas ĉiujn esperantistojn partopreni
[...]

N-ro 942 (2021-04-04)
Flanka evento de UEA kaj TEJO dum la 10-a EKOSOK-Junulara Forumo, la 6-an de aprilo
[...]

N-ro 941 (2021-04-02)
IRIS, Scienca Agado kaj Faka Forumo (4-a kaj 11-a de aprilo)
[...]

TEJO



16-04-2021
Partoprenu en la reta seminario "Klimata Generacio: Nia Planedo, Niaj Rajtoj, Nia Estonteco"
[...]

13-04-2021
Malferma alvoko: Teamanoj por organizi retan IJK-n
[...]

12-04-2021
Serĉata komisiito pri Edukado
[...]

12-4-04-2021
IJK 2021 en Kijivo ne okazos ĉeeste
[...]

06-04-2021
Junulara konkurso "La dudekaj jaroj, alia mondo?" – Premio Grabowski 2021
[...]

01-04-2021
TEJO lanĉas datuman partnerecon kun Google
[...]

30-04-2021
Partoprenu retan eventon pri lingvaj rajtoj
[...]

Venelin Mitev foriris malrapide sub la pluvo (1942-2021)

La granda bulara esperantisto. ĵurnalisto, poeto, verkisto kaj tradukisto Venelin Mitev foriris de ni ĵaŭde la 15-an de Aprilo. Mi kredas, ke li ŝatus, ke ni adiaŭ lin per unu belega versaĵo el lia versokolekto "Взривени сънища" (Eksplodigitaj sonĝoj), kiun li mem tradukis antaŭ precize 3 jaroj, kaj kiun mi havis la honoron redakti. (Mariana Evlogieva)



PLUVSOIFO

Foriras mi kun vaka koro.
Jam silentiĝas la doloro
kaj baldaŭ forfluos ĉio el memoro mia
kiel akvarelo.

Nun mi soifas pluvon –
subitan,
furiozan,
neniigan,
kiu forpelos tiun ĉi silenton kulposentan.

Ie en la foro ekkriis strigo.
Ne, tio ĉi animo mia estas –
pekulo, kiu pentas.

Nur post momento ankaŭ ĝi –
senhonte nuda –
ekiros malrapide sub la pluvo
kaj marĝos ĝis la fortoperdo.

Ĉu iam mi atingos savan bordon?
Mi ne plu scias.
Sed ree sonas en oreloj miaj
"La kanto de l' spiritoj super l' akvoj"
de Goethe.

Ĉar animo mia
similas al la akvo –
ĝi venas de l' ĉielo,
altiĝas al l' chielo
kaj tuj revenas al la tero –
eterna rondo.

Mi kredas je la viv' postmorta,
samkiel kredas mi, ke tie ĉi mi estis
jam dek- aŭ cent- au eble eĉ mil-foje.

Kaj mi ekiros malrapide sub la pluvo...

Venelin Mitev

Ciklo kun Hori Jasuo -- hajkoj kaj poemetoj de Elena Popova e Bulgario

Flor' kun tri koroj –
Trifoli' oksalido.
La Kvarfoliera flor'
promesas feliĉon, sed
ĉiu nokte dormetas...



Kuko kun ruĝa
fazeol' en Japani'.
Majstre farita!
Bonan apetiton al
ĉiuj familianoj!...



En pura river'
naĝas inter la floroj
iu anaso.
Ĉu vivos longatempe?
Ĉu la homoj nur ĝuos?



Kolomba revo –
flugi pli kaj pli alten.
Kiel la homoj...
Paca birdo, ŝatata
de la homoj en la mond'.



verkis kaj sendis
Elena Popova
el Bulgario
bildoj de **Hori Jasuo**
el Japanio



FILMOJ, KIUJN MI SPEKTIS KUNE KUN MIA PATRINO

Antaŭ la aĝo iri al la kinejo sole, kiaj estis la kinejoj, kiujn mi eniris kaj la filmoj, kiujn mi spektis, tenante la manon de mia patrino? Kaj kion mi spektis unue sur la granda ekrano, kie dissemigis kaj burĝonis mia amo pri kino? Mi palpas mian memoron. Ĉar la knabo en tiuj tagoj estis ankaŭ "tabula rasa" 1. Li spektis la filmon per siaj okuloj kaj koro. Li ne faris analizon. Ĝi estis rekta akcepto...

La unua, kiu venis al mia kapo estas: "Dirkie, Perdita en la dezerto" (Dirkie, Lost in The Desert, 1969). Knabo kaj hundo, kiuj postvivis la frakasiĝo de malgranda aviadilo fluganta super dezerto. Mi memoras, ke li flugis kun lia patro, sed mi rerigardis al la recenzo de la filmo, kaj malkovris ke li estis fluganta kun sia onklo. La filmo estas sudafrika produktado de la jaro 1969. La filo de la direktoro ludis la ĉefan rolon. Mi certe havis 5 aŭ 6 jarojn, kiam mi spektis ĝin. Mi scias tion ĉar mi estis en aĝo en kiu

mi bone memoras kelkajn kvadratojn el ĝi. Mia panjo diras, ke mi ploris dum mi spektis la filmon, jes, kaj ni ambaŭ estis tuŝitaj. Tiu knabo luktis por travivi dum multaj tagoj... Kaj lia patro daŭre serĉis lin... Mi memoras bildon de serpento. Mi memoras, ke li rompis ovon de struto kaj manĝis ĝin. Aviadila frakaĵo, infanaj krioj... Eble ne tiom grava filmo sed mi estis tre impresita de ĝi. Unua marko sur "Tabula rasa"!

La dua: "Amrakonto" (Love Story, 1970). Mi ankaŭ ploris fine de ĉi tio. La junulino (Ali MacGraw) ekkanceriĝas kaj mortas en hospitalo, kie ŝi

estis kuracata. La malespero de la junulo, kiam li perdis sian koramikinon, la neĝo ekster la hospitalo, estas la bildoj, kiuj restis en mia menso. Kaj kompreneble, la fama ĉefa muzika temo de ĉi tiu filmo, kiu ankoraŭ aŭdiĝas en radio, televidilo, kaj interrete. Komponaĵo de Francis Lai. Ĉi tiu filmo estas inter la neforgeseblaj, kompreneble, ne tiel, kiel "Dirkie,

Perdita en la dezerto". Kaj tiu memorinda repliko de la junulo (Ryan O'Neal), kiam li diris al sia patro (Ray Milland): "Amo signifas neniam devi diri, ke vi bedaŭras". Mi spektis la hospitalan scenon de la filmo denove en Youtube kaj mi ploris denove. Filmo pri la historio de riĉa junulo kaj malriĉa junulino, kaj la junulo, kiu rezignas de sia riĉeco pro sia amo. Erich Segal verkis la romanon, la filmon direktis Arthur Hiller, sed tio, kio restis en la memoro de knabo estis la ĉefaj aktoroj, la muziko kaj neĝo.


Kompreneble, mi ne plorante rememoras ĉiujn filmojn, kiujn mi spektis kun mia patrino!

Ekzemple estis iu filmo titolita "Kion vi faris en la milito, paĉjo?" (What Did You Do in the

War, Daddy? , 1966). Mi memoras James Coburn en la ĉefa rolo kun sia tatara aspekto. Ĝi estis komedia filmo. Usona milit-trupo eniras en italan urbeton. Italoj ĉi tie ne volas batali. Ilia tuta zorgo estas organizi siajn tradiciajn festojn kaj piedpilkan ludon. Unu el la aferoj, kiuj plej ridigis nin ambaŭ, estis kiam ili starigis reciprokan batalscenon por ŝajnigi sin batali, kaj ankaŭ registri tion ĉe fotilo, dum kiam foje pasis gvataviadiloj. Mi ankaŭ memoras iujn fragmentajn bildojn de nazioj.

Alia komedia filmo: "La sekreto de Sankta Vittoria" (The Secret of Santa Vittoria, 1969), kiu en Turkio montriĝis per la titolo "La sekreto de la urbeto". La ebriaj bildoj de la granda aktoro Anthony Quinn per vinbotelo en sia mano, lia grimado sur alta akvo-rezervujo, lia malsupreniĝo de tie, la dancaj scenoj, lia kverelado kun sia edzino Anna Magnani... Do amo por Italio, la itala lingvo, kaj la identigo de "itala" kun komedio enfosiĝis en mia memoro pere de ĉi tiuj filmoj.

Alia filmo estas "Patton" (1970). Eble George C. Scott brilis plej multe per ĉi tiu rolo en sia tuta kariero. Li enfosiĝis en mia memoro la pasian oficiron Patton, liajn vizaĝajn trajtojn, malmolan esprimon kaj pasiajn gestojn. Spektante filman dokumentarion prezentitan de Francis Ford Coppola antaŭ du tagoj, mi eksciis, ke li mem verkis la scenaron. Mi ne scias, kia estis la vera Patton, kia soldato li estis, sed ĉio, kion mi scias, estas, ke li estis tiu pasia, impulsema, obstina viro sur la granda ekrano.



Kelkfoje mi pensas, ke io ŝajne malproksima en la efektiveco estas tute proksime. Mi demandas min kiom longa distanco estas inter feliĉo kaj malfeliĉo kaj tiu ĉi afero okupas min tiun ĉi momenton, ĉar mi deziras rakonti la historion de Pelopso kaj la deveno de tiu ĉi mia heroo, kaj pli ĝuste, la sorto de lia patro, kondukas min rekte al tiaj pensoj.



Patro de Pelopso estis Tantalos (Τάνταλος) kaj tiu persono estis unu el la plej potencaj kaj gravaj suverenoj de sia epoko; lia reĝlando de la regiono de Lidio (Λυδία) kaj Paflagonio (Παφλαγονία) etendiĝis ĝis Frigio (Φρυγία) kaj Trojlando (Τρωάς).

Tiu Tantalos estis favorata de la dioj kiuj amis lin multe. Tiel, li estis la sola mortemulo kiu, invitite en la dian restadejon, sur la monto Olimpo (Όλυμπος), partoprenis dian bankedon, eĉ li gustumis ambrozion kaj trinkis nektaron!

Tiu favoro, tamen, ne utilis Tantalos, kiu, trafite de troa aroganteco, opiniis ke li estas egala al la dioj. Nu, li invitis ilin en sian palacon kaj oferis al ili riĉan festenon, kaj, inter aliaj mirindaj manĝaĵoj, li oferis bonege kuiritan homan viandon, viandon el sia propra filo, Pelopso, kiun tiucele li buĉis, dispecigis kaj kuiris. Li faris tiun hororaĵon, pensante, ke la dioj ne komprenos ke ili manĝas homan karnon kaj tiele li pruvos ke li povas ilin trompi. Komprenoble la dioj ne estis trompitaj, ili tuj komprenis kion Tantalos oferis al ili, kian abomenan teruraĵon li faris, do ili submetis lin al tre rigora, eterna puno, pri kiu tamen mi ne parolos ĉi tie; interesas nin nur tio, ke nia heroo, Pelopso, naskiĝis dufoje, ĉar, komprenoble, la dioj redonis al li vivon, mi diru ke iamaniere li resurektis!

Kiam viriĝis, Pelopso foriris de sia patrujo kaj, post longa, plenaventura vagado, li atingis Helenujon. Tie, en Heliso (Ηλίς) kaj Pison (Πίσσα), tre vasta regiono entenanta ankaŭ la mond-konatan Olimpion (Όλυμπία), la naskiĝlokon de la tuthelenaj Olimpiaj Ludoj (Όλυμπιακοί Αγώνες), reĝo estis Ojnomao (Οινόμαος), suvereno potenca, sed persono tre fiera,

severa kaj senindulga.

Tiu Ojnomao havis nur unu infanon, filinon kiu estis nomata Hipodamia (Ιπποδάμεια). Tiu junulino estis eksterordinare bela, sed estis ne nur tio, ŝi posedis ian tre raran, neeksplikeblan ĉarmecon, ŝatatecon, kiu allogis la virojn post la unua rigardo, vekis al ili neordinaran, senbridan seks-pasion, kvankam ŝi mem ne deziris tion. La homoj, kiuj ne simpatiis Ojnomao, diradis, ke eĉ la reĝo mem estis enamiĝinta je sia filino, kaj ili diris tion, ĉar Ojnomao tute klare montris, ke li ne deziras edzinigi sian filinon. Eble tio ja okazis, eble li sekse amis sian filinon, tamen la vero estas, ke kiam Hipodamia estis ankoraŭ tre juna, la reĝo estis ricevinta orakolon el la sankta divenejo de Delfoj (Δελφοί), laŭ kiu la viro kiu edziĝos kun lia filino mortigos lin kaj uzurpos lian tronon. La fiera reĝo, kiu ne volis montri, ke li timas ion ajn, diradis nur tion, ke li edzinigos sian filinon kun viro, kiu povos prui sian bravecon, forton kaj kuraĝon.

Tiel, ĉiun kandidaton kiu aŭdacis sin prezenti kaj peti la manon de la reĝidino, li elvokis al ĝismorta duela konkurso kaj tiu duelo estis long-distanca ĉarkurado tra lokoj krutaj kaj sovaĝaj. La fino de tia konkurso estis de antaŭe konata, Ojnomao ĉiam venkis kaj ĉiam mortigis sian kontraŭulon. Li ĉiam venkis ne nur ĉar li estis eksterordinare forta kaj lerta batalanto, sed ankaŭ ĉar li posedis armilojn nevenkeblajn kaj ĉevalojn, kiuj estis pli rapidaj ol la plej forta vento. Ĉio tio ĉi estis donaco de lia patro, de la dio de la milito, Areso (Άρης). Kaj estis ne nur tio, Ojnomao ĉiam havis kun si dum la kurado, Mirtilon (Μυρτίλος), la plej bonan kaj faman ĉariston de la tuta lando, koĉeron, pri kiu la homoj diradis, ke li kapablas komprenigi al la ĉevaloj siajn ordonojn, kvazaŭ ili estus homoj. Notinde, ke la kontraŭbatalanto de Ojnomao devis havi kun si sur sia ĉaro, dum la tuta kurado, Hipodamian, kondiĉo kiu malfaciligis lin, kiu devis atenti ne nur la konkurson sed ankaŭ la objekton de sia ampasio. Ojnomao, estante tute certa pri sia supereco, ĉiam donis al sia konkuranto avantaĝon, ĉiam li lasis lin ekiri la unua, dum li mem tute trankvile faris sanktoferon de kapro ĉe la altaro de Zeŭso (Ζεὺς). Nur post la fino de la ceremonio li ekiris kaj, kiel estis tute certe, post kelka tempo li atingis la kontraŭulon, li alproksimiĝis kaj per sia nemaltrafebla lanco mortigis lin.

Ĝis kiam Pelopso atingis Pison, Ojnomao estis jam mortiginta dek tri junajn virojn kiuj deziris edziĝi kun Hipodamia. Malgraŭ tio, aŭdinte multon pri ŝi, la



junulo deziris ekkoni la fatalan raĝidinin kaj tio okazis en publika festo. Ekvidinte la belegan junulinon li eksentis tiun neeksplikeblan amoretakon, kiun senvole ŝi kaŭzis kaj tuj aspiris ŝin.

Tamen, en la okazo de Pelopso rolon ludis ne nur la troa ĉarmeco de Hipodamia, sed ankaŭ la riĉaĵaro kaj potenco de ŝia patro. Pelopso deziris ne nur la junulinon sed ankaŭ la tutan landon kaj povon de Ojnomao.

Pasis kelka tempo dum kiu Pelopso ekzamenis atente kaj metode ĉion rilate al la administrado kaj la tuta situacio de la ŝtato kaj, poste, kaŝe alproksimiĝis al la reĝidino kaj, kompreneble, enamiĝis je ŝi ankoraŭ pli multe. Feliĉe, tiun fojon la junulino reciprokis la amon de la fremda junulo, ankaŭ ŝi ekamis lin varme, sed antaŭ la geamantoj staris ne trapasebla baro, la danĝera, rigora patro.

Malgraŭ tio, ke Pelopso estis tre forta kaj kuraĝa viro, li estis samtempe sufiĉe inteligenta por eviti tujan, rektan aliron al Ojnomao. Li devis unue fari planon, trovi la rimedojn per kiuj li povus alfronti la reĝon.

Diskutante pri la afero kun sia amatino, en unu ilia kaŝa renkontiĝo, Hipodamia diris, ke ankaŭ Mirtilo estas enamiĝinta al ŝi. Ŝi diris, ke li neniam diris al ŝi ion, tamen ŝi povas tute bone distingi kaj kompreni lian pasion al ŝi. Pelopso komprenis, ke sola solvo estas la helpo de Mirtilo, do, li paciencie kaj atente agis, li amikeme aliris al la koĉero kaj post nelonge li povis gajni lian fidon. Kiam li komprenis ke la ĉaristo estas jam lia amiko, li konfidence konigis al li, ke, laŭ certaj informoj el la palaco, la reĝo celas mortigi sian filinon. Li diris, ke, intencante ŝin savi, li decidis riski sian vivon, fari la lastan, tre malfacilan paŝon, ĉar alia solvo ne estas, li do, aliros al la reĝo, li petos la manon de Hipodamia kaj akceptos la elvokon al la mortiga ĉarkurado.

Mirtilo falis en konfuzon, li arde ĵaluzis sian amikon, tamen li ne povis akcepti la ideon, ke oni mortigus sian amatan virinon. Pelopso komprenis lian heziton, lian internan batalon kaj aŭdacis rekte peti pri lia helpo. Kaj ĉar li komprenis ke la amikaj sentoj kaj la amorpasio ne sufiĉas, li promesis al li, ke post la mortigo de Ojnomao, li disigos la reĝlandon en du partojn kaj li donos la unu al li, li faros lin reĝo! Kaj kiam li konstatis ke Mirtilo estas preta cedi, Pelopso iris ankoraŭ pli foren, celante kontentigi ankaŭ la pasion de la koĉero li promesis ankoraŭ, ke li permesos al li ĝui Hipodamian dum unu plena nokto.

La logaĵo estis granda, Mirtilo, kiu povis nutri neniajn pluajn esperojn, akceptis la oferojn de Pelopso kaj tiele la intrigo estis plektita kaj ĉio sekvis sian vojon.

Mirtilo ne tute firmigis la kojnojn de la radoj, li lasis ilin iom malfiksita kaj tiele, post ne longa rapidega



kurado ili tute eliĝis, la radoj delokiĝis, la ĉaro ekbalanciĝis, renversiĝis, ĉio estis finita. Mirtilo, atendante la finan balanciĝon ĝustatempe eksaltis el la ĉaro, sed la sensuspekta Ojnomao, plektite, de la bridroj estis fortrenita sur la kruta tero, estis violente mortinta!

Niaj tri herooj, tute kontentaj pro la feliĉa fino de sia entrepreno, per la ĉaro de Pelopso ekiris revene al la urbo. Pasante de loko, proksime al kiu estis fonto, Hipodamia soifis kaj petis de Pelopso halti kaj alporti al ŝi iom da akvo. Kiam Pelopso foriris, Mirtilo, kiu por la unua fojo troviĝis tute sola, tre apude al la pasiveka virino, al la fonto de sia longa amorsufero, ne povis sin reteni, do, li atakis ŝin kaj klopodis ŝin seks-perforti. Tamen, Hipodamia kuraĝe rezistis, ŝi komencis lukti kaj ekkrii laŭtege, tiel, ke Pelopso, aŭdinte ŝin, kuris apud ŝi, kaptis Mirtilon kaj de alta krutaĵo faligis lin en la maron, li mortigis lin!

Pelopso edziĝis kun Hipodamia kaj iĝis reĝo de la lando. Li iĝis prudenta kaj amata reĝo, sub kies regado la lando kaj la tuta ĉirkaŭa teritorio prosperis. Li militis kontraŭ ĉiuj suverenoj de la najbaraj kaj de la pli malproksimaj regnoj, li venkis ĉiujn kaj konkeris iliajn landojn. Li estis tre lerta militestro, kun strategio verŝajne senerara, tamen, unu kontraŭulon li ne povis venki. Estis Stimfalo (Στύμφαλος), la reĝo de Arkadio (Αρκαδία) kiu sukcese rezignis kaj konservis sian sendependecon. Tamen, al Pelopso ne sufiĉis parto, li deziris havi ĉion, do, kiam la perforto ne fruktis, li uzis ankoraŭfoje artifikon. Post sia malsukcesa milita atako, li montris sin pacama. Iom-post-iome li alproksimiĝis kaj iĝis amiko de Stimfalo kaj post kelka tempo, kiam tiu lasta fidis lin, Pelopso trovis taŭgan okazon, li murdis, li dispecigis kaj fordisĵetis la korpon de sia kontraŭulo. Tiele li iĝis mastro ankaŭ de Arkadio.

Ŝajnas, tamen, ke tia horora, sakrilegia ago kaŭzis la koleron de la dioj, kiuj sendis al la tuta, tre vasta lando longan sekecon kaj sterilecon. La popolo suferis multe kaj longe kaj la homoj, post multaj jaroj, diradis, ke la interveno kaj la petegoj de Eako (Αιακός), la plej justa homo, kiu post sia morto iĝis unu el la tri juĝistoj de la mortintoj en Hadeso (Αδης), kvietigis la dian koleron, ĉar Eako estis la plej amata kaj respektata de la dioj mortemulo.

Pelopso, vere tre ambicia kaj kelk-foje violenta viro, estis tre prudenta regnestro, justa, kapabla, progresema suvereno, kiu multe utilis la loĝantaron de sia teritorio, kiu antaŭ jaroj suferis sub regado de ne taŭgaj mastroj. Kaj la teritorio influata de Pelopso estis ne nur unu aŭ kelkaj regionoj, sed la tuta duoninsulo, la tuta suda parto de Helenujo, kiu ricevis la nomon Pelopio (Πελοπία) kaj pli poste kaj porĉiame Peloponezo (Πελοπόννησος), nomo signifanta "insulo de Pelopso".

Pelopso vivis longe, feliĉe, kun sia amata edzino Hipodamia, kiu naskis al li ok geidojn, ses filojn kaj du filinojn. Tamen, la granda feliĉo kaj trankvilo ne daŭris ĝis la fino. Pelopso, de konkubino estis akirinta unu ankoraŭ filon, nomatan Krisipo (Χρύσιππος). Tiu junulo estis eksterordinare bela kaj eble pro tio, aŭ ankaŭ pro aliaj kialoj, Pelopso sentis kaj montris apartan amon al li. Tio kaŭzis maltrankvilon al Hipodamia, kiu timis, ke eble ŝia edzo postlasos la regrajton al sia bastarda filo, ne al unu el ŝiaj filoj. Tial, ŝi intrigis kun siaj pli aĝaj filoj, Atreo (Ατρεύς) kaj Tiesto (Θυέστης) kaj murdis Krisipon. Tio krude skuis la animon de Pelopso, kiu forpelis sian edzinon kaj ekzilis siajn du filojn.

Hipodamia iris al Mideo (Μιδέα) de Argolido (Αργολίς), kie ŝi travivis siajn lastajn jarojn. Kelkajn jarojn post ŝia morto, ŝiaj ostoj estis transportitaj al

Olimpio, kie ili estis metitaj en la heromonumento de Pelopso, kiu estis konstruita tie, omaĝe al la granda heroo, kiun la homoj dum multaj jardekoj honoris per ceremonioj kaj sanktoferoj.

Post la morto de Pelopso lian tronon perforte akiris la plej aĝa lia filo, Atreo, kiu iĝis glora gentopatro kaj brila suvereno, kies grandiozeco estis rekonata kaj respektata de ĉiuj helenaj regnestroj. La ceteraj filoj kaj filinoj de Pelopso iĝis reĝoj kaj reĝinoj en diversaj regionoj de Peloponezo kaj de aliaj helenaj lokoj, tiel, la gento de la pridubita heroo, kiu estis kapabla por la plej nobla kaj por la plej malnobla ago, floris kaj brilis dum jarcentoj. Do, ni restu je tio, kion multaj homoj kredas, ke la bona finalo pravigas ankaŭ ĉiujn uzitajn instrumentojn!

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio



el GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO

(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

Bildoĵo el la historio de la Esperanta Literaturo

-- el retejo OLE



Juan Régulo Pérez (1914-1993)

Hodiaŭ mi prezentas al vi ne poeton aŭ romaniston, sed eldoniston kiu ankoraŭ plej klare brilas en memoroj de aŭtoroj, kiuj verkis en Esperanto post la mezo de la lasta jarcento. Tiom

klare, ke la Esperanta literaturo ankoraŭ ĝuas la efikon de tiu brilo en produkto de ĉiam novaj verkoj.

Juan Régulo Pérez naskiĝis la 30-an de marto 1914 kaj mortis la 27-an de januaro 1993, preskaŭ 80-jara. Lia naskiĝloko estas la municipo Garafia sur la norda bordo de la insulo La Palma, la plej okcidenta insulo de la Kanariaj Insuloj. Liaj gepatroj estis malriĉaj needukitaj kamparanoj. Dek jarojn poste ili transloĝiĝis al la municipo Santa Cruz de la Palma, sur la orienta bordo de la insulo. Malgraŭ nefavoraj cirkonstancoj Juan ricevis edukadon kaj fariĝis studento. En 1933, kiam li estis 19-jara, li konatiĝis kun Esperanto kaj komencis instrui ĝin en la posta jaro. Samtempe li fariĝis instruisto en elementa lernejo. Kiam la hispana civila milito komenciĝis en 1936, Juan estis elpelita el sia lerneja posteno kaj nuligita lia instruista diplomo. Li

estis eĉ enkarcerigita por tri jaroj, supozeble pro suspekto pri lia simpatio kun la maldekstruloj. Dum tiu tempo li vivis en koncentrejoj en Hispanio kaj Maroko kaj estis devigita al punlaboro je konstruo de ŝoseoj kaj fortikaĵoj.

Post tiu malfacila periodo en sia vivo Juan decidis daŭrigi sian edukadon kaj komencis studadon de klasika filologio en la Universitato de La Laguna en Tenerife, la plej granda insulo en la Kanariaj Insuloj. Tio estis en 1941, kiam li estis 27-jara. Evidente li brilis en siaj studoj, ĉar tuj poste li estos farita docento kaj sekve profesoro en la Filozofia kaj Beletra Fakultato de la Universitato. Ekde tiu tempo Juan Régulo dum pli ol kvardek jaroj estis tiel ligita al la Universitato de La Laguna, ke li estis konsiderata la vera animo de tiu universitato. Okaze de lia 70-jariĝo la Universitato de La Laguna honoris lin per duvoluma honorlibro, unu en la hispana, la alia en Esperanto. Tiu ĉi portis la titolon Esperantismo kaj enhavas eseojn de 60 verkantoj pri esperantismaj temoj.

Esperanto kaj subteno de literaturo en tiu lingvo baldaŭ fariĝis la ĉefa korokupo de J. Régulo Pérez. Lia klerigada humanismo logike kondukis lin al unika agado serve al la Esperanta kulturo. En 1952 li fondis la eldonejon Stafeto, kiu dum pli ol kvaronjarcento funkciis kiel la plej aktiva kaj avangarda eldonejo de Esperantaj libroj en la mondo. Entute aperis 93 libroj sub la signo de Stafeto ekde ĝia komenco ĝis 1975. La eldonitaj verkoj estis plej variaj laŭ ĝenroj: poezio, noveloj, sciencaj verkoj, biografioj, dramoj, lingvaj analizoj. Estas aparte rimarkinde, kiom altan lokon okupas originala poezio. Tie ne malpli ol 30 poemaroj viciĝas, krom la Esperanta Antologio kompilita de William Auld. La unua en la vico estis Kvaropo, la fama poemaro de Auld, Francis, Dinwoodie kaj Rossetti, baldaŭ sekvis Kontralte de Marjorie Boulton kaj La Infana Raso de Auld. Tiuj poemaroj refluigis la poezian

sangon de Esperanto, kiun Stafeto plufluigis per ĉiam novaj poemaroj de la samaj kaj aliaj aŭtoroj: Eroj de Boulton, Unufingraj melodioj de Auld, Nur tri kolorojn de Eli Urbanová, Ombroj de la kvara dimensio kaj Fajro sur mia lango de Edwin de Kock, Soifo de Tárkony kaj multaj pliaj, por nomi kelkajn el la longa vico de originalaj poemaroj eldonitaj de Stafeto. Mi ankaŭ devas menci, ke Juan Régulo akceptis eldoni mian unuan Esperantan poemaron, Ŝtupoj sen nomo, kaj proprainiciate verkis por ĝi prologon. Tradukita poezio ankaŭ trovis honoran lokon ĉe Stafeto, kie elstaras La floroj de l'malbono de Baudelaire kaj Kantoj kaj romancoj de Heine. Originalaj noveloj kaj romanoj ne estis neglektitaj: Vitralo de Francis, Homoj sur la tero de Engholm, Kiel akvo de l'rivero de Schwartz kaj pliaj. Originale estis ankaŭ verkita la biografio de Zamenhof de Marjorie Boulton.

Ne estas loko ĉi tie por plue pritrakti la eldonliston de Stafeto. J. Régulo Pérez ne hazarde elektis la nomon de eldonejo. Ekde la publikigo de la poemaro Kvaropo en 1952 li antaŭvidis sian eldonadan aktivecon kiel kuranton portantan gravan mesaĝon al ĉirkaŭmondo pri la pulsanta vivanteco de Esperanto. Li tiom vigligis esperantistajn aŭtorojn kaj tradukistojn, ke novaj kaj malnovaj talentoj trovis sin en reala eŭforio, kiu direktis ilin al konvinko pri praveco de ilia elekto de Esperanto kiel esprimilo. Se tiu eŭforia sento eble malaperis, tamen sufiĉaj signoj estas ankoraŭ konstateblaj pri pluvivo de tiu konvinko. La heredaĵo de J. Régulo Pérez vivas kaj vivos en la kultura historio de Esperanto.

de **Baldur Ragnarsson**

(Juna amiko)

Fonto: <http://literaturo.esperanto.net/tekstoj/ragnarsson/regulo.html>


6 >>

Filmon, kiun mi memoras kun malamo kaj kiu ankoraŭ rememorigas min pri tiuj enuaj momentoj, estas la muzika filmo "Tommy" (1975). Mi iris al ĉi tiu filmo de la genia kaj freneza reĝisoro Ken Russell kun mia patrino kaj onklino devige. Knabeto ne havis elekton, ili ankaŭ trenis min. Mi memoras serpenton, skeleton, roko-muzikon, la longajn kaj ondajn harojn de Roger Daltrey kaj sangon kaj teruron. Kaj la ŝvelaj okuloj de Oliver Reed. Sed li ankaŭ estas unu el la aktoroj, kiuj lasis spuron en la historio de kino. Mi ne volis denove spekti ĉi tiun filmon en mia plenaĝeco, nur pro la spuro, kiun ĉi tiu infana memoro lasis al mi. Verŝajne ĝi estas bonkvalita filmo.

Inter la turkaj filmoj, kiujn mi spektis kun mia patrino, la plej memorindaj estas "Espero" (Umut,

1970), "Neĝulino kaj la sep nanoj" (Pamuk Prenses ve Yedi Cüceler, 1971), trilogio "Novedzino - Geedziĝo - Pentofaro" (Gelin, 1973 – Düğün, 1973 – Diyet, 1975) de Ömer Lütfi Akad, unu el la ĉefaj majstroj de direktoroj de la turka kino, kaj la "Kalva Knabo" (Keloglan) filmoserio.

La sola afero forlasita en mia menso el la filmo "Espero", kiu estas rakonto de trezorserĉantoj kaj dilmo de Yılmaz Güney, unu el la elstaraj reĝisoroj de turka kinejo, kaj kiu ankaŭ



>>23

DUA PARTO - LA VIVO

81

Veraj vortoj ne estas belaj,
 belaj vortoj ne estas veraj.
 Kapablulo ne persvadas iun.
 Persvadulo ne kapablas.
 La saĝulo ne estas instruita,
 la instruito ne estas saĝa.
 La saĝulo ne suramasigas posedon
 Ju pli li agas por aliaj,
 des pli li posedas.
 Ju pli li donas al aliaj,
 des pli li havas.
 La TAŬO de l' ĈIELO
 estas stimuli sen damaĝi.
 La TAŬO de l' saĝulo
 estas agi sen konkuri.



Rimarkoj de Anniespera

Vilhelmo:
 „Kapablulo ne persvadas iun.
 Persvadulo ne kapablas.“
 En la originalo ekzistas vorto „shan“ (fonetike), kiu signifas
 „bona“, anstataŭ „kapabla.“ Vd. de Wang Chongfang:
 „La bona homo ne estas elokventa,
 „La saĝulo ne estas instruita,
 la instruito ne estas saĝa.“
 En Ĉinio plej multaj homoj komprenas ilin tia, kia la traduko
 de Wang Chongfang:
 „Tiu, kiu multe scias, ne elmontras sian erudicion,
 Tiu, kiu penas elmontri sian erudicion, ne multe scias.“

(FINO)

La Kimero - Rakonto el la estonteco (12)

-- rakonto de Erik Tantal



Teniso

Kvin jarojn poste.
 „Rapidu“, urĝis Sven. Li intertempe fianĉiĝis al
 Sakura kaj aĉetis biletojn por la granda tenisa turniro.
 „Mi ne scias, ĉu vere estis bona ideo ankaŭ akiri
 biletojn por Volker kaj Irene. Ili nur interesiĝas pri sia
 laboro“, plendis Sakura.
 Sven ne povis subpremi rideton: „Nur atendu, vi
 baldaŭ vidos.“
 Kaj hodiaŭ ili devis atendi vere tre longe. Antaŭ la
 enirejo de la stadiono ili staris kaj la du ankoraŭ ne
 alvenis. Nur je la lasta minuto ili aperis.
 Irene pardonpetis: „Ni bedaŭras, ke ni tiom

malfruas. Bedaŭrinde Volker bezonis
 iom pli longe por finfine fari la ĝustan
 decidon, iri al la turniro. Sed ĉiukaze
 grandan dankon pro la invito.“



„Kiu konkuras hodiaŭ?“, demandis
 Volker malgaje. Li ja venis nur pro la
 forta insistado de Irene. Sven ridete rimarkis: „Nur atendu,
 vi vidos.“ Preskaŭ ĉiuj dek mil sidlokoj de la stadiono
 estis okupitaj. Sven direktis sian grupon: „Venu, ni
 devas iri al la tribuno, ni rezervis la blujajn sidlokojn.“

Sur la granda ekrano legeblis per egaj literoj:

MOJO : MAT STEVENS

Nun ankaŭ Volker iĝis atentema. Antaŭ la hodiaŭa
 tago li ankoraŭ ne vere notis ke Mojo ne estis nur la
 inteligenta superĉimpanzo, li cetere furoris en teniso.
 Pro la reguloj de la internacia tenisa ligo li ne rajtis
 partopreni normalajn turnirojn. Sed, ĉar li ja tiom
 eksterordinare bone ludis tenison, oni volonte invitis lin
 kiel gaston al la plej gravaj tenisaj eventoj. Ĉi tie li ĉefe
 ludis je la komenco kaj la fino de la ĉampionado.
 Kutime liaj kontraŭuloj tiam estis la 'Numero Uno' kaj la
 'Numero Du' de la monda ranglisto. Verdire ankaŭ tiuj
 bonaj tenistalentuloj neniam havis la ŝancon venki
 kontraŭ Mojo. Sed tiel Mojo ĉiam garantiis por
 stadionoj kun sufiĉe granda spektantaro.

La du tenisludantoj nun suriris la ludkampon. Ĉiuj
 spektantoj ekstaris kaj komencis laŭte krii. Oni povis

kompreni nur unu vorton: MOJO! Mat Stevens provis atingi iom pli da atento kaj tial alterne levis kaj mallevis siajn brakojn, sed sen sukceso. Ankaŭ la sekvanta ludo estis fiasko por li. Simila spektaklo okazis je la fino de la turniro. Mojo ankaŭ venkis la plej bonan tenisludanton de la mondo. „Verdire Mojo estas ja la 'Numero Unu'“, komentis Volker kun respekto.

(daŭrigota)

verkis **Klaus Friese** el Germanio
(plumnomo Erik Tantal)

fonto: <http://esperanto-klaus.de/>

el la literaturaj paĝoj de Monda Asembleo Socia (MAS)

tradukis Vilhelmo Lutermano el Kubo

Boto Ŝtraŭso 1: Pri amo

Historioj kaj maloj

Prologo:

Marteno: Ĉu vi ne brakumis min? Ĉu vi ne volis min?

Kristina: Sed mi ja tute ne konas vin!

Marteno: Iru! Revenu!

La amo atendas

Kiu vi estas?

Ŝi volis nur preterpasi. Nur hazarde, ĉar li ne sufiĉe rapide forrigardis, iliaj rigardoj renkontiĝis kaj disŝiris la vualon de fajna indiferento, de deca nerimarkemo, kiu ĉirkaŭas du fremdulojn. 'Kio estas? Kiel vi rigardas min?' Nur ioma hezito, kaj la vizaĝo perdas sian aferecan okupitecon, siajn urĝatajn, nealireblajn intencojn. Ĝi malfermiĝas, ĝi nudigas sian antecon, sian sendefendan seriozon kaj la malluman demandon, kies respondon povas doni nur longa historio, la demando-timegon: 'Kiu vi estas?'

Kiel estis enamiĝi?

Kiel estis enamiĝi? La abrupta konatiĝo kun nekonatino, la sent-ema socia inflamo, la temperaturfalo de fremda al intima, kiu ĉiam iom paligas nin. La abrupta proksimo al ŝia fremda loĝejo, al ŝia fremda gusto, ŝiaj fremdaj vestaĵoj, ŝiaj fremdaj amikoj, ŝia fremda memfido. Kuŝi kun ŝi la unuan fojon embarasis malpli ol demandi ŝin pri ŝia familia nomo. Kaj kiom da frenezaĵoj, kiom da korespondado, kiom da karesnomoj kaj kiom da leĝo estis iam mobilizitaj por doni biografian gravecon al tiu ĉi bonveniga gesto! Pasio, korespondado eventuala, frenezaĵoj apartenas nuntempe sole al la fino, la krizo, la disiĝo, la foriro.

La erota rigardo

La erota rigardo celas malkovri la interesan fremdan personon en mil fajnaj malakordoj. Oni enamiĝas ne en tutan homon. Nur la libera disfalo de

ties aparteco montras, ke la intereso trafis, ke li amebblas. La plej grava de lia persono forvaporigatas, tio ne estas la stato de lia vizaĝo, ne ia idolo, ne iu bela korpoparto; tio ne ĝueblas, nur kaptblas. Tio estas eble ne pli ol eta parolturno, ĉe kiu oni tuj rimarkas, ke ĝi estas transprenita de iu alia; aŭ sendefenda miro, kvazaŭ oni mem ĵus dirintus ion nekoncepteblan, sed la fremda persono miras ĝuste pri propra sento; aŭ iu erara manmovo, ĉe kiu jam precize videblas la impulso de tuŝo. Io intime konata antaŭtempe subite aperas en la nekonata rigardo. Oni vidas: jen la mano, kiu en tiuj ĉi jaroj tuŝos vian ŝultron.



Konsterniĝo

Konsterniĝo pro nia ambaŭa malegaleco en tio, kion oni nomas la 'kuniĝo' kaj devus nomi: la konsterniĝo. Unu fojon, almenaŭ unu fojon. Mi memoras ĉe tio nenian serenecon. Volupto kiel dramo de volupto ne finiĝas per kontentiĝo, plenumo kaj sterniĝo anstataŭ sopiro. Pli ĝuste ĝi estas la sento esti atinginta antaŭe ne penseblan seriozecon. Ĉiu por si, nenia ceremonio plu. Larmoj, ne pro ia ĉagreno, sed por plue flui. Pro tio ankaŭ la deziro iomete vundiĝi kaj sangi, nur por senti la trankviligan fluon. Nenia kompreno por la trivialo. Sed rapide emociebla de praaj, primaraj simboloj: blindeco, maro, domo, skribo, ĉevalo. Kaj samtempe agresema tediĝo je sekundaraj, 'pli socialaj' simboloj: spegulo, mono, ŝuo, floro, pasto, horloĝo - kaj tia fatraso vokanta nin ĉiutage en sian malaltan ordon.

Volupto

Volupto kiel biografia produktado, kiel momento de esprimiĝanta vivo eble neniam duan fojon atingebblas de la samaj du homoj. Post ekscii subite, unu per la alia, tiom da nekonato pri si mem, ili hezitos demandante sin, ĉu ili ankoraŭ kongruas.

Sendube la volupto laŭplaĉe reprodukteblas. Sed male, la graveco, kiun ĝi kreas kaj postlasas, ne. Povas tre bone okazi nur unu solan fojon pinta graveco de la volupto kaj ĉiujn ceterajn fojojn iom malpli. Jen la politiko de amo zorgas pri kompenso. Ĝi

konservas instigan memoron pri la unufoja, subfosa elspeziĝo kaj samtempe protektas kontraŭ tio, ke la multaj pli malfortaj, pli moderaj reproduktaĵoj sentiĝu kiel forvelko aŭ manko.

Okullumo

La amo atendas okullumon. Se brilas okullumo, vi feliĉas. Kiom ajn ni kunfrapu la malsekajn ventrojn, umu kaj baraktu kvazaŭ ondatro, ni tamen proksimiĝas al la afero neniam pli ol per la okuloj, kiuj ne estas kunigeblaj "Rigardu en la sunon, knabo", diris ofte la oficiro en sia lasta tempo, "rigardu kun malferma okulo en la sunon, tio fortigas la okulon. Ĉion entute faras nur la suno. Ke ni entute povas vidi kaj ke la tero estas kolora, tion faras nur la suno." Post la tagmanĝo oni ŝovis lian fotelon al la malfermita fenestro, kaj li lasis sin ami de la suno, ne povis satiĝi. Li, kiu ĉion malamamis kio moviĝas, videble atingis la volupton en la suno.

(daŭrigota)



¹ Botho STRAUSS (naskiĝis la 2-an de decembro, 1944 en Naumburg) estas germana aŭtoro de rakontoj, romanoj, dramoj, eseoj kaj filmscenaroj.

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/Strauss1.html>

Kaftano de Trishko

fablo de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

Al Trishko sur kubut' truiĝis la kaftano.
Sen longa meditat', per sia propra mano,
Li tranĉis de manik' peceton for
Kaj flikis truojn kun fervor',
Kaftan' — en bona stat', nur la manikoj aĉas.
"Ne gravas! Mi al tio kraĉas,"
Sed tamen oni mokas lin.
Do Trishko diras: "Per kombin'
Riparos mi difekton tute,
Kaj longo de manik' normalos absolute."
Ho, Trishko lertas en afer'!
Li tranĉas baskojn de la vesto,
Manikoj jam longiĝis en prosper',
Sed la kaftano mem mallongas en mizer'
Ja kvazaŭ kamizol' modesta.
Jen estas por ekzemplo la okaz':
Sinjoro en financa embaras'
Por malimpliko tre agadas.
Rezulto: en kaftan' de Trishko li paradas.



verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)
Ukrainio

15>> branĉoj. Mi kolektis kaŝtanojn tie aŭtune. Printempe mi admiris la verdaĵon kaj la kaŝtananj florojn.

Postvorto

Je la 2-a de Aprilo 2009 en registroficejo ni geedziĝis post 21 jaroj de nia amikeco. La registristino fotis nin ambaŭ antaŭ mian propran bildon en la fono. Tio estas por ni tute speciala geedziĝfoto.

Ankaŭ en multaj aliaj geedziĝaj fotoj oni povas vidi ĉi tiun bildon.

verkis kaj sendis **Helga Plöetner** el Germanio



(2003) Ŝajnas, ke mia kato eble iĝos korinklinema; iom post iom, oni paciencu, kiel pri ĉiuj „homaj“, liberaj, personaj transformiĝoj, aferoj respektendaj.

Ĝis nun li estis tiel, kiel oni ĝenerale prezentas katojn : memama, memstarema, voluptema korpe, sed tute ne „pneŭmatika“ (kiel dirus Vladimir Jankelevič !). Li havis la egoismon de juneco. Sed estas kiel ĉe ĉiuj : kun maljuniĝo emocia maturiĝo okaziga; jes, kondiĉe ke oni konservintu sian infankoron, nepre - se ne, neniam oni estos alia aĵo ol pli kaj pli etecan pupon ! - aĝiĝanta oni iĝas pli profunde sentema, kaj aliaj aferoj.

Do, li eble finfariĝos „malsovaĝigita“, kiel la vulpo (en la hindia « लोमड़ी ») छोट्टे राजकुमार को लोमड़ी ने कहा- = „al la Eta Princo la vulpo diris“. Eble iam "li" (la « », ne ĉar li estas kato, sed ĉar li estas eksvirigita!) estos tiel

korinklina kiel estis „Poupounette“, mia kompatinda maljuna estulino. Kiu estis tiom amema, dum restante tamen, kompreneble, egale memstarema, obsede, nepre, viscere liberama, kiel estas tiom ece katoj.



Jes, dezirindas ke la homoj estus tiel, kiel la katoj, ili endus preni modelon laŭ ili ; estus bone por la civilizo, ĉu ne ? La nuna totalisma, Pruseca, « politically-correct »-eca diktaturo de nunaj modernaj sufokaj, « Orwellaj », Aldous-Hūxley-aj, socioj disfalintus, kaj estus ankoraŭ esper' pri savi la Civilizecon kaj la homajn valorojn.

Jes, endus, ke ĉiuj la homoj en niaj socioj ekfaradus ian « pasivan rezistadon », malsubmetiĝon, ne frontan kontraŭstaradon, jam tio ne plu havus ŝancon, sed postkulise, surdumadante, stultŝajnumante, per ĉiaj forkuroj, neobeon, senvalidigon de tiu aroganta memkontenta malvarmega diktaturo.

Sed ne estas !

Tiomlonge, ke bonpensantaj bestistoj ne estos je la povo, oni ankoraŭ havos, iom, la rajton havi katojn ! Jam nun oni faras al ili tion, kion oni baldaŭ faros ankaŭ al la homoj, rfid, eŭtanazio. Poste, ne plu estos iu ajn espero.

Tiomlonge, ke estos katoj, estos espero ; poste estos finita. La homaro povos morti.

verkis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

En la jaro 1972 Kosovo estis ankoraŭ marĝinita aŭtonoma regiono de la eksa Jugoslavio. Tamen ĝi havis jam sian ĥoran amatoran ensemblon "Collegium Cantorum", estrata de Mark Kaĉinari, kiu partoprenis la mondan festivalon en Londono, akirante la tria lokon. Tiel Kosovo sin prezentis kvazaŭ memstara respubliko! Tio estis la unua sukceso de



Mark, finstudinta en la muzika mezlernejo en Prizreno kaj en la Muzika Akademio de Belgrado.

Ses jarojn poste, kun la sama ensemblo, li performis la operon "Goca e Kaĉanikut" (La Knabino de Kaĉanik) de la albana kosova komponisto Rauf Dhomi, montrante kie ajn

en Jugoslavio kaj Eŭropo ke albanoj scipovas kanti kaj danci ne nur la popolajn kanzonojn kaj dancojn.

En 1979 li performis la verkon de Mozart, "Rekuiem", unu el la pintoj de la monda muziko.



Dume oni nomumis lin dekanon de la Fakultato de Muziko ĉe la Universitato de Prishtina.

Malfeliĉe, Mark mortis je la aĝo 50. Tamen dum la jaroj 1962-1985 Mark Kaĉinari sin distingis kiel preleganto kaj dirigento, komponisto, muzikologo kaj aŭtoro de lernolibroj.

Li apartenas al la unua generacio de la albanaj studentoj el Kosovo, kiuj finstudis en la Akademio de Muziko de Belgrado (1954-1961) en la fako de la Teorio kaj Muzika Pedagogio. Estante ankoraŭ studento, dum la jaroj 1956-1961, Mark estis regula membro de la profesionista ĥoro de Radio-Belgrado.

En la komenco de XX-a jarcento en Belgrado moviĝis multaj albanoj el Kosovo. Ekde tiam restis ankoraŭ la hotelo "Albania" kaj la placo "Albania" apud ĝi. Ili laboris kiel metiistoj, panbakistoj, restoraciistoj aŭ simple kiel lignohakistoj, stratpurigistoj, desartiistoj...Tiujn oni povis trovi ĉirkaŭ la stacidomo, en la urbocentraj stratoj Terezije, Kalemjdan kaj Taŝmejdan, same en la duarangaj stratoj, kie ili ofertis sin kiel manlaboristoj je mizera pago..

La formiĝanta serba burĝaro strebis konvinki la homojn ke albanoj estas necivilizitaj, stultaj, malkleraj, kvankam ekzistis malmulte da albanoj, ĉefe intelektuloj (studentoj) kiuj elstaris pro altaj rezultatoj en la studado. Ĉi lastaj kvazaŭ defius tiun humiligan koncepton pri la albanoj.



La Muzika Lernejo en Belgrado aperis en la jaro 1899. En la jaro 1902 oni verkis la unuan operan verkon "La Nuptofesto de Miloŝ Kopiliĉ" kaj unu jaron poste oni prezentis, unuafoje en la sceno. alian lokan operon "Je tagiĝo". Post la kreiĝo de la Versaja Jugoslavio en la jaro 1920, en la operejo de Belgrado oni ludis "Madam Baterflaj" kaj ekde tiam la teatro de la opero jugoslava antaŭenmarŝis. En la jaro 1926 en Lubljana stariĝis la Konservatorio kaj samjare, ĉe la Universitato de Belgrado, malfermiĝis "Kollegium Muzikum": (Konservatorio). Eble el tio luis Mark Kaĉinari la nomon por sia ensemblo..

La konservatorio de Zagreb aperis en 1927, alia muzika institucio en Kroatio aperis en 1932.

En la jaroj 30 oni fondis la Ĥoran Serban Asocion, La Madrigalistan Zagreban Asocion, LaFilarmonian Orkestron de Belgrado kaj Novisado ka.

La juna studento el Prizreno de Kosovo estis devigita studi sen stipendio, farante manlaborojn eventualajn. Sed li neniam rezignis je studado.

La ekonomiaj kondiĉoj iel pliboniĝis kiam lin oni dungis en la ĥoro de Radio Belgrado en la jaro 1956, danke al ties melodia voĉo. Tie li konatiĝis kun novaj homoj, pli aĝaj kaj pli spertaj, kaj li multe lernis pri la ĥora arto, kio validus pli poste kiam li fondus sian ĥoron. Dum kvin jaroj da deĵorado ĉe la ĥoro de Radio Belgrado Mark partoprenis en pluraj turniroj en la tuta Jugoslavio kaj ekster ĝi (Italio, Germanio, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Rumanio, Bulgario, ĝis Moskvo). Certe tiel li akiris multe da muzikista sperto.

La sep studjaroj en Belgrado kristaligis en la kapo de Mark ĉiujn projektojn kiujn li realigus en sia Kosovo, kiu plurestis la plej postrestinta regiono en Jugoslavio ekde la jaro 1912 kiam ĝi estis aneksita de Serbio.

Mark Kaĉinari tutanime deziris ŝanĝi la malbonan imaĝon pri albanoj kiel ordinaraj lignohakistoj, aparte en Serbio. Ene de dek jaroj post lia diplomiĝo, Mark sukcesis prezenti la imaĝon de albano - intelektulo kiu scipovas okupiĝi ankaŭ per muziko, eĉ per kultivita muziko, klasika, kiel opero, per la verkoj de Bach, Hendel, Bet-hoven, Mozart.. Kaj tio okazus en Prishtina, kiam ankoraŭ ne ekzistis la operejo! Tion Mark realigis starigante muzikan mekanismon, je latina nomo "Collegium Cantorum", ia filarmonio.



artikolo de Laurant Bica el Kosovo

tradukis kaj sendis **Bardhyl Selimi** el Albanio

La Trajno

*La trajno baldaŭ foriros
plena da senpensuloj
aŭ eble da superpensuloj
kun necerta zigzago
ne komprenante, kial ili
troviĝas tie kaj kion ili
altvaloran serĉas.*

*La steloj deturnantaj
en glora kaj graci plena verdikto
amasigas ĉiujn
sub natur-kroĉtrikita arto
ridindige sed pasie
atendante
ilian aŭdiencon
por kompreni
miskomprenablajn.*

*Haltigu ĝin.
le dum la vojaĝo
ĝi devos perdi sian
anhelan fortecon,
kiel drinkulo, nenion
antaŭ si vidante.*



verkis kaj sendis **Carmel Mallia**
el Malto 02.04.2021
(dum la tragika virusa pandemio)



Antaŭurba Lageto, oleo-pentraĵo sur ornamita metala plato 2,20 x 1,20 m

Post la falo de la Berlina muro mi povis pentri por la urba administracio de mia hejmurbo kadre de laborpostena kreo mezuro en 8 horoj tage. Mi ricevis monatan salajron, kiu feliĉigis kaj kontentigis min. Por la registra oficejo, mi havis la ideon pentri mian amatan antaŭurban lageton kiel motivo.

La preparado de la pentra surfaco estis rakonto en si mem. Mi ne volis moveblan kanvason, lignan panelon aŭ tiel nomatan premitan kartonon. Mi volis senmortan pentraĵan surfacon por mia amata temo. Rustorezista metala plato, titana zinka alojo. Konsultante kun tubisto kaj mia dunganto, la urba administracio, oni ordonis tion laŭ la dezirata grandeco. Surbaze de la bilda ŝablono, mi kalkulis la necesan formaton rilate al la grandeco. Por ke la metala enkonduko aliĝu, mi pene sablis la glatan, grandan metalan platon per la borilo kun sablopecoj. Post kiam la metala plato estis egale malglatigita, mi preparis plurajn fojojn ĝis mi havis bonan kovraĵon, bonan pentraĵan surfacon. Mi transdonis la antaŭan desegnon de la motivo al detalo. Historia nigrablanka foto en longa pejzaĝa formato servis kiel ŝablono. Mi povis desegni la kolorojn libere memore kaj post mia sperto. Tiutempe ankoraŭ estis akva fontano kelkfoje, kaj la insulo ofte estis restrukturita. La plantado sur la alta ŝtona parapeto flanke de la strato estis multaj trikoloroj, kiuj formis la unuan planon tra la tuta bildo kaj supre la vido iris al la lageto, kiu estis tegita per verdaj salikoj. Mi volis pentri la feliĉan monaton majo en geedziĝa etoso. Maldekstre de la bildo tilioj floris kaj fone mi malkovris la florantajn kaŝtanojn kun benko. Tiam mi metis paron da amantoj en la bildon. Paro de cignoj kaj paro de anasoj pliiĝis la geedziĝan etoson. La maldekstran bordon limigas betonaj kolonoj. Kvazaŭ hazarde mi metispaseron sur ĝin kaj kaŝis papiliojn inter la floroj. Mia amo kiel pentristo estas naturo, homoj, bestoj, floroj. Mi tre volis pentri la pensojn en oleo el la naturo. Sur la urboplaco kaj malantaŭ la

urbodomo apud la fostkolono staris konkretaj sitejoj, kiujn la urba administracio plantis kun trikoloroj. Mi elektis la plej belan el ili kaj elektis ilin por pentrado post kiam mi ĉirkaŭrigardis tiel ke neniu rigardu. Ĝi funkciis, por mi ĝi ne signifis ŝteli. Konfide mi elektis ilin por la bildo por la urbo! Post la ĝusta prepara desegnaĵo de la ĉeftemo sur la enkonduko, mi komencis pentri la malfonon kun la trikoloroj. En la maldekstra mano mi tenis la florojn antaŭ miaj okuloj kaj per la dekstra mano mi pentris la florojn diverskoloro per peniko kaj oleo-farboj: blanka, flava, purpura, ktp., De la antaŭo, de la flanko, de la malantaŭo, kun burĝonoj, en diversaj stadioj de florado ĝis la floroj komencis velki sub mia maldekstra mano. Post provo, mi trovis vazon kun akvo en mia maldekstra mano netaŭga. Tiam mi elektis aliajn trikolorojn, kiuj riĉigis la bildon en sia diverseco. Je la fino mi kalkulis ĉirkaŭ 400 trikolorojn laŭ ilia natura grandeco en mia bildo. Alie mi pentras miajn bildojn de supre malsupren por ne ŝmiri la malfonon per la pentraĵa mano. Por ĉi tiu unua granda bildo, mi pentris de malsupre ĝis supre surbaze de mia intuicio. Maljuna artista amiko, kiu ne plu povis pentri, donis al mi sian grandan memfaritan stablon por ĉi tiu bildo, kiu mirinde taŭgis por la formato de 2.20mx 1.20m. Mi ofte iris al la antaŭurba lageto por studi la kolorojn de la akvo, la betonajn kolonojn, la paron de anasoj, la verdajn tonojn de la arboj en la printempon, kaj poste revenis al mia laboro sur la bildo. Mi povis efektiviĝi miajn impresojn kaj ideojn per pentrado. Mi povis intense prilabori la bildon trankvile en ĉambro apud la konstrua aŭtoritato de la urbo dum naŭ monatoj ĝis la vicurbestro trovis la bildon kompleta. Ne mi! Mi volonte daŭre laborus pri la paŝtejoj memkritike. Mi devis kviete interkonsenti kun la necesa fino. Nu, ĝi estis farita.



La bildo pendas en la registra oficejo ekde 1992 en ligna kadro speciale farita de la urba administracio. Mi ŝatis la antaŭurban lageton kiel lerneja infano, ĉar mi tiutempe loĝis en la Damaschkestrasse kaj ĉiam preterpasis ĝin. Kiam la lageto frostiĝis vintre, mi gliitkuris sur ĝi. Foje mi ludis sur la malaltaj salikaj

>>12

Estis bela decembra vespero. La aero pleniĝis je diversaj odoroj. Surstrate amaso da homoj gajiĝis. Homoj preparis sin por festi la Novan Jaron.

Je la oka vespere forlasis tri ursetoj la domon kune kun Petro. Ili renkontiĝis kun najbaro, kiu ŝanĝis ilian planon por ĉi tiu solena vespero.

Nome, Petro decidis, ke ili piediru al la domo de tiu najbaro. Li klarigis, ke en lia domo homoj festis la naskiĝtagon de sia filo kaj ke ili estus feliĉaj se tri ursetoj pligrandigu ilian feston. "Ni vidos" – estis la vortoj de Petro.

La granda pordego estis malfermita. En la domokorto ili ekvidis gajan junulo-grupeton dancantaj kaj de tempo al tempo fajfantaj laŭ ritmo de la laŭta muziko. Tri ursetoj malŝatis tiom fortan muzikbruon. Do, ili flankeniris laŭ la domomuro. Sur la muro tuj aperis ombroj de iliaj grandegaj kapoj .

Tiam unu el la knaboj elkuranta el la domo ekkriaĉis. "Kio estas tio! Tri kapa monstro!"

Baldaŭ ĉiuj ĉirkaŭiris la triopulojn. Ĉiu scivole rigardis la tri allogajn ursetojn.

Dume la nekonata najbaro prezentis sin klarigante al la gastoj pri kio temas. Tri ursoj kaj Petro sidiĝis dum junaj knabinoj alportis al ili po tason da mielo kaj teon al Petro .

Petro admire balancis la kapon. Lia rigardo vagis en la ĉambro: nenio mankis. "Plaĉa riĉa aspekto de la domo!" – ekpensis li trankvile . Tiam li ekvidis junulon sidanta en rulseĝo.

"Kiu estas li?"

La najbaro, Tomo, respondis iomete embarase. "Li estas nia filo Niki. Li estas paralizita ekde sia naskiĝo. Krome li havas aŭtisman. Mi volis lin surprizigi, venigi geamikojn al li. Vidu, tiuj knabinoj estas volontuloj, kiujn mi venigis helpi min prepari la feston same okazis kun tiuj junuloj dancantaj en la domokorto.


"Luj venis post mia peto kaj klarigo, samkiel vin mi petis por plibeligi lian feston pere de via ĉeesto" klarigis li atente rigardante nin kun zorga vizaĝmieno.

Post momento knabinoj enportis sur la pladojn manĝaĵon. Tiom abundeco da frandaĵo! Ili ĉiuj gastigis sin kaj kontente dankis al la najbaro Tomo.

"Je sano de via filo, Niki!" Ni tostis kun la gepatroj de Niki. Niki ridetis kontente kaj time tuŝis la felon de ursoj. Nia, bluĉapulo "Klaŭno" ridigis nin, precipe la povran knabon, Niki.

Je la deka vespere rimarkis Petro, ke ili jam

malfruis por partopreni al la novjara aranĝo. Do, ili decidis resti tie kaj gajigi la novan amikon, Niki. Samtempe, en la urbo placo Jana kaj Pavlo havis siajn novjaran programeron. Ili gaje kantis dum Sara elkore aplaudis al ili. Larmoj pleniĝis okuloj de Sara. Tiuj larmoj estas larmoj de feliĉo.



"Amikoj, kial ni ne serĉu niajn amikojn anstataŭ ĉi-tie festi kun urbanoj?" – proponis Jana tuj depost ŝia kantado. Ili ĉiuj konsentis. Kaj ekis serĉado.

Je la duono de ilia vojo al la domo de nekonata najbaro ili surprize renkontiĝis kun unu el la knabinoj el la domo de najbaro Tomo. Ŝi diris serioze: "Mia mastro alsendis min. Viaj geamikoj estas ĉiuj bone kaj ĉiuj alvokas vin ĉeesti je nia festo honore al Niki."

"Bone, ni kuniros al via domo" ŝi returnis sin kun rideto al Pavlo. Li kuntiris la brovojn sed ekiris konsentite. Atinginte la domon ili tuj renkontiĝis kun Petro.

La tutan nokton ili restis kun la familio de Niki. Tiel pasis la novjara festo. Ĉiuj kantis kaj dancis kaj distre amuziĝis .

Okulfrape brilis ĉio, precipe la okuloj de Niki. Li estis feliĉa ĉar li ne estis sola kiel li al kutimiĝis dum la pasintaj jaroj .

Li estis ege trista. Tial lia patro Tomo, decidis fari al li magion. Kiel li ĝojis!

La geknaboj esprimis dankon al la najbaro Tomo kiu tre afable ilin kolektiĝis. En aŭroro oni disiĝis.

Ekscita pompo regis survoje al la domo de Sara. Tri ursoj pavparade marŝadis. Ĉirkaŭ iliaj koloj filtris diverskoloraj maŝoj. La donacoj de Niki.

Frumatene en la sekva tago venis senditoj de najbaro Tom por vidi, kiel fartas Sara kaj ŝiaj tri ursoj. Fakte tiuj estis novaj tri amikinoj, helpantinoj dum la Novjara festo ĉe Niki.

Subite hastis poŝtisto portante telegramon al ŝi. Ĉiuj enpanikis ne sciante kio okazis. Sara nervoze malfermis la ricevitan telegramon legante laŭtvoĉe.

"Pro via sincereco kaj neegoismo, mi, Tomo, la patro de Niki, alvokas vin ferii tute senpage dek tagojn ĉe marbordo, en nia fama vilaĝo. Niki. Stop! Ni ekiros depost du semajnoj. Lunden! Bonvenon! Tien ni renkontiĝos!"

Ĉiuj vizaĝoj radiis pro ĝojego! Ĉiuj ekridis! Kio sekvis? Bonvolu legi la daŭrigon de la Mirinda renkonto!

(fino de la sepa parto)

verkis kaj sendis **Miriĉ Jadranka** el Serbio

Ŝercoj



KION VI FAROS HODIAŬ?

Kruko: Kion vi faros hodiaŭ, Banĉjo?
Baniko: Ho, mi ne scias. Mi supozas, ke nenion.

Kruko: Ĉu vi ne faris nenion jam hieraŭ?
Baniko: Jes, sed mi ne finis.

EFIKA MEDIKAMENTO

Baniko: Mi konsultis mian kuraciston hieraŭ.
Kruko: Ĉu vi malsanas?
Baniko: Mi havas daŭrokazantajn dolorojn ĉie en mia korpo.

Kruko: He ja.
Baniko: Sed la kuracisto diris ke mi estas nur hipokondria. Kaj mi respondis, ke tio estas ridinda.

Kruko: Do?
Baniko: Fine, li preskribis al mi iun eksperimentan medikamenton. Sed ĝi nur misefikis; mi sentis naŭzon, letargion, febron....

Kruko: Ĉu vi scias kiun medikamenton li preskribis?
Baniko: Jes. Estas iu nova medikamento

nomita "Placebo".

RABISTO

Baniko plendas: Mi estis prirabita hieraŭ vespere -- jam la trian fojon ĉijare de la sama viro!

Kruko: Ĉu trifoje? De la sama viro? Ĉu vi rimarkis ion apartan ĉe li?

Baniko: Jes. Ĉiufoje li aspektis pli bone vestita....

tradukis **Rikardo Cash** el Francio
publikigita kun lia permeso

Fonto: esperanto-anekdotoj@googlegroups.com



Krucvortenigmo



HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Intence difekti maŝinon; 6. Alimaniere; 11. Hako post hako estas la plej efika ___ (Zamenhof); 12. Tondo, incizo; 13. Teksaĵo uzata por kapti fiŝojn; 14. Ĉefurbo de Aŭstrio; 15. Membro de grupo; 16. Grimpa aŭ volviĝanta planto; 17. Unua duono de Odro.; 18. La litero J; 19. Ĝi enhavas paĝojn; 20. Patro de patro; 21. Roko, ŝtono; 22. Kolektivan; 23. Kia estas via laboro, tia estas via ___ (Zamenhof); 25. Organo de la vidkapablo; 26. La ĉefa dio en la ĝermana mitologio; 27. Teleron.

1	2	3	4	5			6	7	8	9	10
11						12					
13					14						
15				16						17	
18			19						20		
		21						22			
23	24						25				
26						27					

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Ĉefurbo de Bosnio-Hercegovino; 2. Ĉefurbo de Grekio; 3. Frapo; 4. Sepo, ____, naŭo; 5. La litero T; 6. Loko, en la centro de cirko, rezervita por bataloj; 7. Felo de ŝafoj; 8. Filino de Kadmo; 9. Partikulo, signifanta insiston pri la realeco de neatendita fakto; 10. Ĉefurbon de la Unuiĝinta Reĝlando; 12. Speco de alta turbano; 14. Vibrado, tremo; 16. Mezurunuo de volumeno simbolita per L; 17. Kurbo, kiu iel similas

- elipson; 19. Tiu flanko de ŝipo, kiu estas ŝirmita kontraŭ la vento (akuzativo); 20. Prepozicio esprimanta la netuŝan proksimecon; 21. Partikulo uzata por formi la komparativon; 22. Sepa, ____, naŭa; 24. Anno Domini; 25. Partikulo, esprimanta diferencon.

Fonto: Semajno de Enigmoj #7
<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)

Kun dankego kaj memoro pri ĉiuj el la unua linio, en ĉi tiu malfacila situacio por nia lando kaj la mondo trafita de COVID-19.

A tente, li metis sian poŝtelefonon apud sin kaj fermis okulojn. La laciĝo pezis sur liaj palpebroj. Jam dum unu monato li ne povis satdormi kaj ripozi. La streĉo estis nekredebla. Kiom da tempo pli li povus elteni?

Li eksentis soifon, li leviĝis kaj prenis la botleton kun minerala akvo. La gluto refreŝigis lin. Li ne sentis malsaton, nur soifo turmentis lin plurajn tagojn. Se li povus dormi almenaŭ duonhoron, li verŝajne sentos sin pli bone. Denove li fermis siajn okulojn, atendante la dolĉan dormeton.

Pika sonoro de la poŝtelefono rompita la silenton.

Lia mano ekserĉis la telefonon

– Mi vestas min kaj foriras – li rapide respondis ne atendinte la voĉon el la telefono.

– Paĉjo...

– Ho, karuleto, ĉu estas vi? – rideto ekbrilis sur lia vizaĝo.

Rapide li ŝaltis la videokonekton. Sur la malgranda ekrano ekbrilis la vizaĝo de lia tri jara filineto Nija. Ho, kiel ŝi mankis al li.

– Paĉjo, kiam vi venos?

– Baldaŭ, infaneto mia. Ankoraŭ iom da tempo kaj paĉjo revenos hejmen. Kion vi faras?

La etulino ion pepadis, sed ŝia voĉo estis rompita de la akra sonoro de la telefono.

– D—ro Dejanov, vestu vin! Ni foriras! – La laŭvica ordono estis donita.

Ĉi tie la minuto gravas, ĝi estas tre grava por savi homan vivon.

Li apenaŭ ekleviĝis de la soflito. Lia kapo estis peza, liaj kruroj ne obeis lin, kaj li ne povis spiri normale. Li faris paŝon al la pordo, sed kvazaŭ stumblis je io, ekbalancis kaj preskaŭ ne falis sur la liton.

"Kio okazas al mi?" – ĉi tiu penso fulmrapide pasis tra lia kapo. Li trinkis gluton da akvo kaj sidiĝis sur la randon de la soflito. Li levis manon por tuŝi sian frunton. Sed io haltigis lin kaj lia mano restis pendanta en la aero. Tio ne estis necesa. La simptomoj estis klaraj.

"Kiam kaj kiel tio okazis?" – la unua penso venis al lia kapo. – "Ĉu tio estas tiom grava?" – li respondis al si mem. Li sciis, ke tio povus okazi. Ĉiuj, kiuj ĵuris la Hipokraton ĵuron, sciis tion.

– Vi ne, ne estas devigata! – lia edzino ekkriis, kiam li diris al ŝi, ke li decidis fariĝi volontulo en "Urĝa

helpo" – Vi estas kirurgo, eĉ ne kardiologo.

– Jes, sed mi estas kuracisto! Kaj mi povus sukcese plenumi mian devon. Ne sufiĉas kuracistoj! Volontuloj estas necesaj.

– Kaj vi pretas iri tuj? Se io okazos al vi? Tiam?

– Tio povas okazi al ĉiu ajn. Sed oni uzas ĉiujn, preventajn rimedojn, kiujn la ŝtato provizas por protekti nin.

– Tio ne garantias al mi, ke vi estos protektita! Kaj ĉu vi pensis pri mi, pri la infanoj, se io okazos al vi!

– Ĉi tiu povas okazi al ĉiu ajn, kiu laboros en ĉi tiu malfacila por nia lando situacio. Ĉu ni rajtas rifuzi plenumi nian devon, la devon de ĉiu kuracisto?

– Sed tio ne estas via devo! Vi estas kirurgo. Vi ne estas devigita riski!

– Sed mi iras kiel volontulo. Ne sufiĉas kuracistoj. La kirurgiaj fakoj estas fermitaj, oni ne faras operaciojn, eĉ la planitaj estas prokrastitaj. "Urĝa helpo" bezonas medicinistojn. Mi estas kuracisto kaj mi pensas, ke mi scipovas labori tion.

– Ne faru ĝin, mi petas vin! Mi timas pri vi, pri ni, se la plej malbona okazos. Pri infektitaj medicinistoj kaj mortintaj oni informas, ĉiutage. En la statistiko Ilia procento estas plej alta.

– Mi konsentas, sed ili estas tie ĉar ili estas fidelaj al sia devo. Komprenu min precize, karulino, mi ne povas esti nur observanto, kiam nia lando bezonas kuracistojn, kiuj povus helpi kaj savi nin de ĉi tiu nekonata infekto. Ĉu mi povas resti indiferenta, mi eĉ dirus kiel kuracisto – flanko observanto, kiam miaj kolegoj, kun granda peno, klopodas al venki ĉi tiun teruran malsanon.

– Mi komprenas vin, sed ankaŭ vi komprenu min. Mi timas!. Se io okazos al vi, mi ne povos travivi ĝin. Kaj kio pri la infanoj! Ĉu vi pensis pri ili?

– Karulino, mi pensis tre longe antaŭ ol tion decidi. Mi pensis pri vi kaj la infanoj. Vi ja scias kiom forte mi amas vin. Mi estas preta je ĉio ajn por vi. Mi havis malfacilan elekton. Mia devo de kuracisto kaj mia amo, mia timo pri vi. Mi estas kuracisto, kiu ĵuris la plej humanan – la Hipokraton ĵuron.

Post ĉi tiuj vortoj li etendis sian manon kaj forte premis sian plorantan edzinon al sia brusto.

Ili ne parolis pli. Li ne vidis pli ol monato ilin, sian edzinon kaj la infanojn – Nija kaj la kvinjara Orlin. La telefono estis la nura ligo inter ili.

Ĉi tiu konversacio fulmrapide pasis lian menson. Li ekserĉis apogon sur la soflito, sed ĝi estis malproksima, kaj li malsupreniĝis sur la plankon.



– Doktoro, ni atendas vin! Ni jam malfruiĝas! – flegistino Anna ekstaris ĉe la pordo, vestita en protektaj vestaĵoj, kun masko kaj kasko. – Ho mia Dio, doktoro Dejanov, ĉu vi aŭdas min? – ŝia voĉo tremis. La flegistino faris paŝon antaŭen, poste haltis. Ŝi volis

foriri sed turnis sin al la kuracisto, kuŝantan sur la planko, kaj diris kviete, kvazaŭ al si mem:

"La tricent dektria."

verkis kaj sendis **Ivaniĉka Maĝarova** el Bulgario

La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj -- de Vytautas Petkevičius

tradukis kaj sendis
Antanas Vaitkevičius el Litovio

1. Ĉearbare

En ia tereno apud arbaro kreskis maljuna Kverko, tiom maljuna, ke neniu konis lian aĝon. Ne memoris sian naskiĝtagon eĉ la Kverko mem. Jen li rakontadis, ke onidire tiusomere kreskis floroj pli grandaj ol li mem, jen malsingarde li aldonadis, ke dum la aŭtuno de tiu jaro putriĝis ĉiuj rapoj.

Vera maljunegulo estis ĉi Kverko, do ĉiuj kvazaŭ interkonsentinte nomis lin reĝo de la arbaro. Jam delonge li ne floris, ne posedis florburĝonojn, ne kreskigis glanojn. Li eĉ forgesis, kiom da infanoj li havis.

- Vŝŝ... centojn... Vŝŝ... centojn da centoj... Vŝŝŝ, - susuradis li por si mem kaj la vento taŭzadis liajn maljunajn, per verda musko ĉirkaŭkreskintajn branĉojn.

Ĝuste sur la pinto de Kverko estis ennestiĝinta Korvo. Iom pli malsupre havis apartamentojn Kolombo. En kelkaj arbokavernoj loĝis tri fratoj Sturno, Sturneto kaj Sturĉjo. Sub la plej granda branĉo sian loĝejon el argilo estis modlinta Hirundo. Apud ŝi en malgranda breĉo mastrumadis Pasero. Kaj malantaŭ tiu sub la plej granda folio pigre kuŝis heliko.

Kaj tiel ĉiuj vivis: dum printempo kantadis, pepadis, ludis, dum somero infanojn kreskigis kaj aŭtune iuj al la varmaj landoj direktiĝis kaj aliaj en arbokavernoj vintron trasuferis. Alkutimiĝis Kverko al ĉiuj siaj loĝantoj, amikiĝis kun ili kaj pensis, ke sen ili ne kapablus vivi eĉ unu horon.

Sed iam printempe sur la plej juna branĉeto, kiu estis nur tricent tridekjara, ekburĝonis floreto kaj poste ekkreskis ankaŭ Glano. Kverko tute freneziĝis, pro sia filo nek tage, nek nokte okulojn ne fermis, kovradis lin per siaj folioj kontraŭ la pluvo, ventolis lin kontraŭ varmego, gardis lin de simuloj kaj muŝoj. Kaj Glano kreskis, drinkigata per la plej bongustaj suktoj, li ampleksiĝis, fortiĝis ĝis kiam li ekestis fortika brunvanga fraŭlo.

Sed ju pli Kverko dorlotis sian filon, des pli enuiĝis tiu pro proksimeco de sia patro. Ne ĝuis la solfileto nek silente susuratajn fabelojn pri griza kaj nobla pasinteco, nek birdajn kantojn, malatentis li ankaŭ la plendojn kaj ĝemojn de la maljunulo. Tintilante sur la

branĉo, Glano mokis, incitis ĉiujn kaj faris diversajn spritaĵojn. Foje dum silenta vespero, kaptinte kulon en la subkverka lageto, Rano preparadis vespermanĝon por sia familio kaj vokis sian filinon:

- Kuotre, Kuotre, Kuotre! *

- Kion? Kion? Kion? – eĉ ne movis pro pigremo ĉi tiu.

- Prrrenu trrranĉilon, prrrrenu trrranĉilon, prrrrenu trrranĉilon...

- Kian? Kian? Kian?

- Akrrran, akrrran, akrrran...

Sidante sur la folio de akvolilio, Kuotre turnis grandajn elpufiĝintajn okulojn kaj ne movis. Iom atendinte, ŝia patrino ĉion rekomencis:

- Kuotre, Kuotre, Kuotre!

- Kion? Kion? Kion?

Glano pripensis timigi ilin. Celiĝinte li forlasis la branĉon kaj plonĝis en la akvon ĝuste ĉe Kuotre kaj eĉ ŝprucigis ŝin per akvogutetoj. Ege terurigita la rana familio subakviĝis kaj kaŝis sin en ŝlimo. Kaj Glano, tiamaniere okupinta la folion de la akvolilio, ridegis ĉirkaŭbrakinte siajn flankojn: al li tre plaĉis, ke ranoj tiel timas lin.

La maljuna Kverko estus konvene insultinta la stultetulon pro tio, tamen kvazaŭ speciale ne ekblovis vento kaj ne tremis eĉ unu folieto. Nur la ĉikanema Sturneto, vekinte siajn fratojn, ne povis pacienciĝi, kaj etendinte flugilojn komentariis:

- Jen tiu ĉi, jen tiu ĉi, jen tiu ĉi. Bruadas knabaĉ, bruadas knabaĉ!

Konsentis kun li Sturno:

- Ĵetis li, ĵetis li, ĵetis li!

Sed kontraŭdiris al ili Sturĉjo:

- Ja saltis li, ja saltis li!

Dormetema Pasero elbreĉigis sian kapon kaj insultis ĉiujn komune:

"Ho, kvivit, kvivit kvivite!

Silentiĝu vi subite!

Ve, kvivit! Mi dormas! Vidu!

Dormas mi! Min ne incitu!"

Sturneto kun siaj fratoj atakis Paseron. Pasero vokis siajn infanojn kaj edzinon por helpi lin. Kaj



ekbruis la tuta arbo. Glano, kvereliginte ĉiujn, naĝis surborden kaj pacience kurbiĝis en loko ŝirmita de vento: li atendis ĝis kiam mankos aero en la Kuotrea pulmo.

La duan fojon li saltis sur la lilian folion, renversis ĝin kaj Kuotre pro tio perdis sian voĉon por la tuta diurno, kvankam la malfeliĉa patrino vokis sian filinon pernome kaj plendis al Kverko.

Sekvontmatene, eĉ ne sukcesinte lertigi siajn muskolojn kaj lavi dormŝvelintajn okulojn per roso, Glano jam fanfaronis pri siaj neordinaraj aventuroj en la lageto plenkreskinta de lemnoj. Li nur prisilentis, ke duonon de siaj herooj li nokte sonĝis, kaj la alian duonon li simple pripensis, rememoriginte sian salton en la lageton.

Glano ŝatis inciti kaj aflikti pli malkuraĝajn kaj malfortajn ol li mem. Li ne kapablis nun vivi sen tio. Ĝuste tagmeze li eniĝis en la modlitan dometon de Hirundo kaj imitante patrinan voĉon, incitis la etulojn:

*"Kuirita kaj fritita,
Kuirita kaj fritita
Jen – la bongustaĵ!"*

La hirundidoj malfermadis beketojn, kvivitis, atendis ĝis kiam la bongustaĵo estos liverata, tamen li nur incitis ilin, ĵetante al ili pecetojn da arboŝelo.

Alfluginta patrino kaptis Glanon je kolo kaj ĵetis lin for. La petolulo nur renversiĝis enaere kaj pumfalis en herbojn. Feliĉe li sukcesis trafi la plantagan folion kaj aliel neniu konas, kiel estus ĉi flugado finiĝinta. Ŝanceliĝinte iom sur la folio de Plantago, kvazaŭ sur la fajrobrigada savtuko, Glano grimpis malsupren, ĉar la furioziĝinta Hirundino flugadis laŭtere kaj plendis al Kverko:

*"Kvazaŭ ŝtelist'! Kvazaŭ ŝtelist'!
For lin! For lin!"*

Kverko promesis vergbati la filan ŝelon, sed tuj forgesis kaj susuris kiel kutime.

Kaŝante sin en herboj Glano ekvidis kelkajn rondajn, taŭgajn por ĵetado ŝtonetojn. Li forkapigis sian bereton kaj kolektis ilin ĉiujn. Kolektinte li ekĵetadis ilin ĉiudirekte. Ŝtonoj ja ne taŭgas por kaĉo.

Tiutempe Kolombo kun sia tuta familio kuradis sur dika branĉo, kapjesadis kaj instruis la etulojn:

*"Stultiĝos homoj,
Stultiĝos homoj:
Ĵetados pizojn surkampe,
Ĵetados pizojn surkampe..."*

Glano celis kaj ĵetis unu ŝtoneton al la kolomba dorso. Kolombo pensis, ke tio estis pizo kaj rukulis:

- Kaŭriĝinte mi diris, kaŭriĝinte mi diris...

Glano ĵetis unu plu. Kolombo kaptis kaj forglutis ĝin.

- Kaŭriĝinte bekmanĝis, kaŭriĝinte bekmanĝis, - fanfaronis li, kaj nur forglutinte perceptis la veron. Glano ankoraŭfoje mansvingis, sed estis malfrue: Kolombo kaptis kaj sufiĉe punbatis lin. Glanon savis nur lia dika ŝelo.

Poste, reveninte al siaj geinfanoj kaj edzino, li kuradis sur la dika branĉo kaj komentariis la eventon:

*"Per baston' mi batis,
Kuŝiĝinta bekmanĝis, kuŝiĝinta bekmanĝis...
Kapt!"*

Kverko nur svingis la branĉojn, konsentante kun li.

Neniel finiĝis la spritaĵoj de Glano. Trovinte la pendantan ŝnuron de Araneo, li ektentis la plej junan filon de Heliko balanci sin. Li ligis lin je la kornoj kaj tiom ŝanceligis lin, ke tiu ekkriegis per antaŭe neniam aŭdita voĉo. Aŭdinte la kriegon sur la arbon alflugis Turdo kaj jam preparis kapti la helikidon. Li estus forglutinta lin, se anticipi ne estus fanfaroninta:

*"Kaptis mi ranidon,
Kaptis mi ranidon!..
Grasan, grasan
Grasuleton,
Bona gust', kiel porkaĵo!.."*

Tiutempe alflugis Korako, forpelis Turdon, kaptis la ŝnuron kaj alportis la helikidon al la patrino.

Tio estis la lasta guto, tropleniginta lakalikon de la najbara pacienco. Ili decidis komune disciplinigi Glanon. Estis elektita la gepatra komitato kun Sturĉjo kiel prezidanto, ĉar nome li faris la plej belan paroladon dum la kunveno. Krome, lia kandidateco estis subtenita per belegaj kantoj de liaj fratoj.

La tutan tagon la gepatroj kunsidadis kaj neniel venis al la konsento. Unuj postulis, ke Glano estu postajbate forpelita el la arbo, duaj petis ke lia maljuna patro estu indulgita, triaj ankaŭ ion proponis, tamen neniu kompatis la krimintan petolulon.

- For lin, for lin! – ne povis forgesi la aflikton Hirundo.

- Per bastono bati, per bastono bati,- subtenis lin Kolombo.

- Frapi, frapi, frapi! – levadis la flugilojn Sturno.

Subbite ekblovis vento kaj Kverko susuris:

- Ne decas aflikti infanojn, ne decas...
- Aŭdinte tion, Hirundo korektiĝis:
- Instrui lin, instrui lin!
- Kaŭriĝinte mi petas, kaŭriĝinte mi petas,-
subtenis lin Kolombo.

Ĉi propono estis akceptita unuvoĉe. Kun tio konsentis ankaŭ Kverko.

*Ĵemajta (litovdialekta) virina nomo.

(daŭrigota)



"La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj" estas libro de litova verkisto Vytautas Petkevičius (1930 – 2008). Li estas sufiĉe konata kaj precipe fama pro siaj porinfanaj kreaĵoj.

Mi prezentas

sendis Elena Popova el Bulgario



KARAJ LEGANTOJ DE REVUO "TURKA STELO",

Dum marto 2021 aperis mia lasta libro "ESPERANTO – PONTO AL AMIKECO".

En ĝi mi prezentis miajn gekorespondantojn el Bulgario, Germanio, Turkio, Nederlando, Brazilo, Ĉinio kaj Japanio, kiuj estas poetoj, verkistoj, pentristoj, eldonistoj. Mi verkis pri ili, ĉar ĉiuj indas estimon, ĉiuj laboras pri la E-ideo.

Preskaŭ ĉiuj tekstoj antaŭe estis publikitaj en la revuoj - Bulgara Esperantisto, Turka Stelo, Literatura Foiro, Penseo, Esperantista Tribuno kaj aliaj. Mi dankas al la redaktoroj Georgi Mihalkov, Vasil Kadifeli, Perla Martinelli, Vejdo kaj Dimitrinka Kateva.

Mi dankas al la redaktoro de la libro Vasil Kadifeli, al Ivaniĉka Maĝarova - konsilanto, al Maja Gorova - pentristino de la kovrilo kaj al ĉiuj geesperantistoj, kiuj helpis al mi pri la eldono de la libro. Ankaŭ al la estontaj legantoj!

Nia lingvo Esperanto estas kaj estos viva!



Elena Popova el Bulgario

La Blanka Simio

-- el Noveloj de Tang-Dinastio

En la lastaj jaroj de Datong-erao (535-545), Liang-dinastio (502-556 p. K.), Lin Qin, la Sudpaciga Generalo, estis sendita suden militi. Atinginte Guilin, li frakasis la armeojn de Li Shigu kaj Chen Che.

Alia generalo Ouyang He okupis ĝis Changle kaj konkeris ĉiujn klanojn en profundaj kaj krutaj montkavernoj. Ĉe Ouyang He estis edzino delikate blanka kaj tre ĉarma virineto. Iu subulo diris:

"Kial vi kunportas kun vi tiel ĉarman belulinon dum militmarŝo? Sciu, Via Generala Moŝto, ke ĉi tie estas demono, kiu ofte rabis knabinojn, precipe tiujn belajn. Do zorgeme gardu vian edzinon!"

Ege maltrankvila Ouyang He sendis soldatojn noktgardi ĉirkaŭ lia loĝejo kaj kaŝis la edzinon en sekreta kabineto firme fermita, kun pli ol dek servistinoj garde akompanantaj.

Estis venta kaj obskura nokto. Ĝis la kvina nokta

gardoperiodo okazis ankoraŭ nenio eksterordinara. La gardantoj sentis iom da malstreĉiĝo kaj pretervole dormetis, sed tuj vekiĝis de io surpriza kaj jen la edzino jam malaperis, dum la pordoj restis fermitaj. Neniu povas scii de kie ŝi malaperis. Ekster la pordo vojbaras alta krutaĵo kaj la prema noktobskuro ĉion neniigis nevidebla, malhelpante la akuratan serĉadon.

Je la tagiĝo oni retrovis jam neniun postsignon. Vundate de la forta indigno kaj doloro He ĵuris ke li ne foriros antaŭ ol retrovo de sia edzino. Li petis permeson restigi sian armeon pro malsano kaj ĉiutage serĉadis disflanken al malproksimaj krutaĵoj trans ravinoj.

Tiel pasis pli ol unu monato. Ĉe bambua bosko pli ol cent liojn distanca oni hazarde ektrovis unu brodŝuon de la edzino, kiu, kvankam pluve malsekigita, tamen restis sufiĉe rekonebla. Tio portis al Ouyang He pli grandan ĉagrenon, sopiron, kaj plifirmigis lian

decidemon por trovi la edzinon. Tridek bravaj soldaatoj serĉadis kun armiloj kaj manĝaĵoj, sin penetrante tra la montvaloj kaj ripozante sub la ĉielo.

Forpasis ree pli ol dek tagoj. Ili foriris de sia tendaro jam ĉirkaŭ ducent liojn. Leviĝis sude belsilueta monto kun abundaj arbaroj kaj ĉirkaŭbaranta profunda rivero kiun ili transveturis per floso memfarita. El inter la smeraldaj bambuoj sur la klifo flagris jen kaj jen ruĝvestitoj kaj alŝvebis de tempo al tempo ridoj, voĉoj. Manprenante lianojn la serĉantoj surgrimpis la klifon. Antaŭ ili jen viciĝas belaj arboj intermikse ornamataj de raraj floroj. Verda herbaro sterniĝis sube kvazaŭ mola tapiŝo. Vere kristale kvieta mirlando!

Tra la orienta ŝtona pordo iras dekoj da virinoj kun elegantaj silkaj pelerinoj kaj pimpaj vestaĵoj, sin amuzante per kanto aŭ babilo. Vidante la homojn, ili heziteme retenis siajn paŝojn kaj atendis rigardante. Kiam He kaj liaj soldatoj alproksimiĝis, la virinoj ekdemandis:

"Kial vi venas ĉi tien?"

He respondis. La virinoj interŝanĝis suspirojn kaj diris:

"Via amata edzino venis ĉi tien jam pli ol unu monaton. Nun ŝi kuŝas malsana en la lito. Vole ŝin konsolu!"

Ili eniris la pordon, kies klapegoj estis el ligno kaj vidis tri grandajn kaverno-halojn, de kies muro ĉiuflanke staris litoj, senescepte kun brokataj kusenoj.

La edzino de Ouyang He kuŝis sur ŝtona lito en luksaj litkovriloj kaj antaŭ kuriozaj frandaĵoj. Sed, apenaŭ He alproksimiĝis al la edzino, ŝi ekrigardis lin kaj haste mangestis ke li tuj foriru!

La virinoj klarigis:

"Inter ni, la samsortaj kiel via edzino, tiu, kiu venis plej frue, restis jam dek jarojn. Ĉi tie loĝas diaĵo, kiu estas tiel fortega, kun povo hommortiga, ke por ĝin rivali ne sufiĉas eĉ cent armitaj soldatoj. Estas feliĉe, ke ĝi ankoraŭ ne revenis, do rapide ĝin evitu for! Tamen, se vi alportos du vazojn da forta vino, dek grasajn hundojn kaj kelkdek ĝinojn da linŝnuroj, ni helpos al vi ĝin atenci. Ĝi revenas ĉiam post tagmezo, do vi alvenu ne tro frue. Ni atendos vin post tagdeko."

Laŭ admono de la virinoj Ouyang He senprokraste forrapidis kaj revenis je la difinita dato kun la forta vino, linŝnuroj kaj hundoj. La virinoj diris:

"La monstro treege ŝatas vinon kaj ofte drinkis ĝis ebrio. Ebriiĝinte ĝi emis pavi sian fortegon tiel, ke ni ĉirkaŭligu ĝiajn membrojn al la lito per silkaĵoj, kiujn ĝi disrompis per ekmoviĝo. Foje ni ĉirkaŭligis ĝin per tri oblaĵ silkaĵoj, kaj ĝi ne sukcesis liberigi sin. Ĉifoje ni ligos ĝin per silkaĵoj subkaŝitaj per la linŝnuroj, do kredeble ĝi ne povos ilin disrompi. Ĝia tuta korpo estas tiel dura kiel fero, nur unika loko je kelkaj koloroj

malsupre de la umbiliko, kiun ĝi ĉiam gardis zorgeme, certe ne povas rezisti armilojn."

Kondukante He-n al apuda kaverno la virinoj diris:

"Jen ĝia konservejo de manĝaĵoj. Embuske atendu ĉi tie kaj viajn vinon ni dislokigu sub la floroj kaj hundojn inter arboj. Kiam sukcesis nia plano, vi elsturmu laŭ nia manvoko!"

He kaŝis sin laŭ la admono de la virinoj kaj atendis tie kun retenataj spiroj.

En posttagmezo, aperis io kiel blanka strio, kiu alpafiĝis fluge de aliaj montpintoj kaj rekte eniĝis en la kaverton, de kie eliris post nelonge blanke vestita belbarbulo pli ol ses futojn alta kun bastono enmane kaj ĉirkaŭita de la virinoj. Ekvidante la hundojn, li ege surpriziĝis, sed tuj sin ĵetis kapti ilin, kiujn li disŝiris kaj satmanĝis suĉe-ŝmace. La virinoj konkure prezentis al li la vinon per jadpokaloj, kokete ridante. Ravite li eldrinkis kelkajn doŭ-ojn da vino kaj estis braktenata de la virinoj en la kaverton, de kie baldaŭ aŭdiĝis gajaj ridoj.

Post sufiĉe longa momento, Ouyang He ĝisatendis la virinan mansignon kaj eksturmis kun preta armilo en la kaverton, kie li vidis gigantan blankan simion kies kvar membroj estis firme ligitaj ĉe la lito. Ekvidante homon, la blanka simio embarasiĝis kaj furioze baraktadis por sin liberigi, sed vane. Ĝiaj okuloj brilis fulme. Konkuraj hakadoj al ĝia korpo kvazaŭ trafis nur feron aŭ ŝtonon, sed la piko al ĝia subventro efikis ĉe la enpiko sango ekŝprucis fonte.

"Ho ve! Jen la Ĉielo, sed ne via kapablo mortigis min!" vekriis la simio, "Nun via edzino jam gravediĝis. Nepre ne mortigu ŝian filon, kiu servos al eminenta imperiestro kaj honorigos la familion." Dirinte tion, la simio mortis. He traserĉis la kavernojn kaj trovis abundajn trezorojn. Kuriozaj frandaĵoj plene kovris tablojn en vazoj kaj kolektiĝis ĉi tie ĉio karega en la homa mondo. Estis trovitaj ankaŭ kelkaj vazoj da famaj parfumaĵoj, paro da antikvaj glavoj kaj tridek virinoj, senescepte belegaj, el kiuj la pli frue alvenigitaj restadis tie jam dek jarojn. Laŭdire, tiuj virinoj, kies beleco reduktiĝis, estis forkondukitaj oni ne scias kien. Sed la geiĝon por sinnutrigo la simio faris nur si mem, sen neniuj alia kamarado. Ĉiumatene, ĝi sin lavis, portis al si ĉapon, blankan subŝtofitan robon, kaj senkoloran silkan vestaĵon, sendiference ĉu en frostaj aŭ varmaj tagoj. Sur ĝia tuta korpo ĉie kreskis blankaj haroj je kelkaj koloroj longaj. Ĝi ofte legi s lignajn tabuletojn kun ideogramoj similaj al amuletaj signoj, nekompreneblaj por aliaj. Post legado, ĝi metis la tabuletojn sub ŝtona ŝtu paro.

En serena tago la simio ŝatis svingi paron da glavoj kiuj rondflugis ĉirkaŭ ĝia korpo kvazaŭ fulmo kaj brilis kiel la plena luno. Ĝi manĝis neregule, tre ŝatis

fruktojn aŭ kaŝtanojn, sed precipe hundojn, kiujn ĝi voris sangosuĉante. Tagmeze ĝi ekmalaperis. Dum tagduono ĝi povis ir-reveni inter distanco de miloj da lioj kaj vespere certe revenis. Tio estis ĝia kutimo. Ĉion, kion ĝi deziras, ĝi povas akiri dum palpebrumo. Nokte ĝi ĝuis voluptivon.

Dum unu nokto ĝi povis rondviziti al ĉiuj litoj koiti tute sendorme. Ĝi parolis erudicie, belfraze kaj akre, tamen ĝia konduto ĉiam odoris per forta simieco. Kurantjare en la malfrua aŭtuno, kiam komencis fali la folioj de arboj, ĝi subite diris malĝoje:

"Mi estis akuzita de Montdio kaj kondamnita al morto. Mi jam petis protekton de la aliaj genioj kaj eble ricevos pardonon."

En lasta monato, nelonge post la pleniĝo de la luno, fajro ekforbruligis la tabuletojn sub la ŝtona ŝtuparo. La simio diris malespere:

"Mi vivis jam mil jarojn sen filo. Nun, kiam la filo aperos, venas la tempo por mia morto."

Ĝi larmis longe al la virinoj dirante:

"Tiu ĉi monto estas neatingeble kruta por homoj. Desupre mi neniam vidis eĉ hejtajfkolektiston, kaj malsupre svarmas tigroj, lupoj kaj ferocaj rabbestoj. Atingi ĉi tien oni povas nur laŭ la volo de Dio, ĉu?"

He revenis al sia tendo kun la gemoj, trezoroj kaj la virinoj. Kelkaj el ili ankoraŭ memoris la vojon al sia hejmo. Post unu jaro, al la edzino de Ouyang He naskiĝis filo, vere simila al la vera patro.

Poste, Ouyang He estis ekzekutita de la imperiestro Wudi de Chen-dinastio (557-560 p. K.). Lia intima amiko Jiang Zong tre amis la filon kun elstara saĝeco kaj lin patronis tiel ke li eskapis el la malfeliĉo. Kiam li elkreskis, li efektive fariĝis fama per sia talento en beletro kaj kaligrafio.

9>> elstaras pro sia maldekstrema politika identeco, estas bildo de serpento en la grundo kaj Yılmaz Güney (li ankaŭ rolis en la filmo) turniĝante ĉirkaŭ si tenante la kapon per siaj manoj.

Mi memoras nur kelkajn erajn aferojn de la tri filmoj de Ömer Lütfi Akad "Novedzino - Geedziĝo - Dieto". La tiama trirada veturilo nomita "triportör" multe uzita en la 70-aj jaroj, la malriĉa familio loĝanta en aĉa domo, kiu bakis kaj vendis "lahmacun"ojn², la majstro-aktoro Erol Günaydın, kiel unu el la familianoj, kaj la juna aktorino Hülya Koçyiğit... Mi ne havas pliajn detalojn en mia menso. Mi ne memoras, kiu aktoro rolis en kiu filmo, en kiu filmo estis la vendado de

"lahmacun"oj, kaj en kiu filmo mi spektis la "triportör"on.

Pri la filmo "Neĝulino kaj la sep nanoj", mi memoras Zeynep Değirmencioğlu, unu el la junaj steloj de la tiama turka kinejo, kiu ludis la principinon. La aktoro, kiu ludis Dopey (la kalva nano), tre ridigis min. Kiam li kantis

infanrimaron per raŭka kaj amuza voĉo li multe ridigis min. Mia patrino diras, ke ĉiuj en la kinejo forlasis la filmon, kaj komencis ridi pro mia ridego. Jarojn poste, el mia amiko kaj muzikisto Aysun Timurcan, mi eksciis, ke ĉi tiu aktoro estis lia samurbetano Aydın Babaoğlu el Karadeniz Ereğli urbeto.

Fine, mi ne povas forgesi Rüştü Asyalı, kiu rolis kiel la senmorta speco de popola heroo de turkaj fabeloj, "Keloğlan". Ŝanĝante sian voĉon, kaj kantante per krispa voĉo, li rolis majstrece. Mi ne povas forgesi Suna Pekuysal, la aminda kaj amata stelo de teatro kaj kino, kiu rolis kiel lia patrino. Ankaŭ en unu el la filmoj de tiu serio, Kayhan Yıldızoğlu, tre valora kaj veterana aktoro, rolis kiel veziro³, se mi bone memoras. Liaj brovoj kaj okuloj tiam timigis min.

Kino estas io, kio rekonstruas realan vivon, sed ankaŭ io, kio rekonstruiĝas en niaj mensoj tra la jaroj. Post jaroj, nia cerbo rompas la bildojn, kiuj eniras en ĝi, kiel prismo.

Eble mi spektis pli da filmoj kun mia patro. Kaj ankau pli maturaj filmoj por mia aĝo... Mi skribos pri ili ankaŭ en la venonta fojo.

¹ **tabula rasa** : en latina "malplena tabulo" aŭ "blanka tabulo" ktp

² **lahmacun** : maldika pico kun muelita viando bakita en forno

³ **veziro** : Otomana ŝtata titolo. La plej proksima asistanto kaj konsilanto de Sultano.

verkis kaj sendis **Konuralp Sunal**
23-a de aprilo 2021
Büyükdada – İstanbul, Turkio



ZONGULDAKLI AYDIN — 18 yasında olan Aydın Babaoğlu, Zonguldak'tan getirtilmiş. Boyu, topu topu 65 cm. olan Aydın bekar. Fakat 7 cillerinin arasından en çapkını olarak seçiliyor.



Saluton. Mi estas Laj Mondo, malnova esperantisto.

Pasintsemajne mi sonĝis: kvazaŭ mi sidas en kuirejo kaj atendas matenmanĝon. La ovaĵo kun kolbasetoj fritiĝas, sonas kvazaŭ telefono:

– Halo! – mi aŭdigis min.

– Saluton. Kun vi parolas Osmano Muller, la ĝenerala direktoro de Centra Oficejo.

Mi malfermis okulojn kaj timiĝinta perceptis tenanta enmane ne kuleron, sed telefonon. Mi ekrigardis horloĝon: estis ĝuste noktomezo... Ĉu mi ankoraŭ sonĝas?

– Ĉu mi parolas kun sinjoro Laj Mondo? - sonis plu.

– Sed pro kio vi telefonas nome al mi? – mi volas percepti.

– Mi telefonis al multaj personoj... Sed neniu nenion komprenas...

Direktoro parolis longe tamen mi ne ĉion komprenis. Mi ruĝiĝis kaj blankiĝis eĉ eklarmis – tiom da afablaj kaj sinceraj vortoj dum mia tuta vivo mi ne estis aŭdinta. Kaj fine mi aŭdas malgajan lian voĉon:

– “Nur vi sola estas tia...”

– Kia? - ekmiris mi.

– Nur vi sola perceptas la gravecon de la situacio... – daŭras li.

– Kaj kia estas tiu situacio? - interesiĝas mi.

– Vidu, degeneras la ĝenerala lingvonivelo de esperantistoj. Multas fuŝaj tekstoj en Esperanto, abundas eternaj komencantoj, simple interreto videbligis al ni tion, kio antaŭe estis kaŝita... - Mi interrompis lin kaj kontraŭargumentis:

– Ĉu vi praktikas nacilingve en la interreto? Ĉu vi rimarkis, kio okazas tie, kiom oni fuŝas naciajn lingvojn? Ne nervoziĝu.

– Sed esperantistoj ne legas librojn, periodaĵojn, - ne ĉesis direktoro.

– Kaj bone faras, - aldonis mi. - Antaŭe estis nur kelkaj eldonejoj, kiuj eldonadis nur bonkvalitajn, lingve kontrolitajn eldonaĵojn, kaj nun... verki libron kaj eldoni ĝin povas iu ajn. Kaj legante tiajn kaj similajn librojn vi saĝa kaj klera neniam iĝos.

– Sed atentu sinjoro Laj Mondo, nin primokas la mondo ĉirkaŭa, priridas kaj tretas nin, esperantistoj forlasas UEA, - ne ĉesas direktoro.

– Kaj ĉu mi kulpas? Kion vi volas de mi? - tedis al mi.

– Mi proponas al vi postenon de la prezidanto de UEA. Ĉu vi konsentas? - scivolis direktoro. - Kion vi faros?

Mi kapneis kaj plendis, ke mi estas mallertulo kaj

stulta, ke mi ne scipovos, ke mi havas cerban moliĝon.

– Tro multe da libroj antaŭe mi tralegis, - sindefendis mi.

– Kiam vi iĝos prezidanto, ĉio normaligiĝos kaj via cerbo malmoliĝos...

– Mi ne kapablos, sinjoro direktoro. Vi pardonu min. - ne ĉesis mi.

– Necesas, - daŭris direktoro. - Neniu povas.

– Ĉu neniu volas? - ekinteresiĝis mi.

– Multaj personoj volas, - direktoro nur ekĝemis. - Sed mi ne plu ilin konfidas.

– Do kio okazis? - scivolis mi.

Direktoro longe silentis, suspiris kaj poste eldiris:

– Ege malbonas, sinjoro Laj Mondo. Uĥ, kiel malbonas...

– Vi neniam nenion aŭskultu... Vi havu vian opinion, vian kapon, ideojn, vivoplanojn... Vi iru vian vojon kaj ne gravas, kion oni parolas pri ni... Oni parolis, parolas kaj parolos... Ne nervoziĝu...! Tia estas la vivo... Ni iru la vojon celitan, - mi provis mildigi la situacion.

– Neniuj nin helpas, jam delonge ni iras sole, - ne ĉesis direktoro.

Mi aŭskultis, cerbumis, ĉar mi komprenis la gravecon de la afero.

– Mizeruloj, - nun ankaŭ mi ekploris. - Do, se nun la afero stas tiel... Kion fari...

– Tre bonas, ke vi, Laj Mondo, neniam perdas esperon. Kion ni faros sen vi...!

Kaj jen! Mi konsentis iĝi Prezidanto de UEA... Metinte telefonon, per tremantaj manoj mi viŝis ŝviton kaj pensis: “Necesis almenaŭ demandi, kian utilon mi ricevos. Ne, nun jam tro malfruas. Nun li jam ne komprenos...”

Sed nun, kiam mi ĵus decidis iĝi Prezidanto de UEA, tuj mi eksentis min pli saĝa ol estis antaŭe... Ĉion mi komprenis plene, trae... Nun al mi ĉio iĝis klare, pro kio esperantistoj fuŝas la lingvon. Tio ne plu estos. Mi estas ne tia... Kaj al malveraj esperantistoj nun venos nigraj tagoj. Nun necesas komenci decidemajn konkludojn. Eksentinte senliman alfluon de la fortoj, mi tuj decidis iri al Rotterdamo kaj fari tie revolucion... Mi vestis min, foriris el mia hejmo kaj iris ĝis la domangulo: - tie estis mallume, malvarme, malseke... Mi haltis, ekretis per piedoj... kaj revenis hejmen. Tiel finiĝis mia revolucio.

verkis kaj sendis **Laimundas Abromas** el Litovio



Unu el la plej grandaj misteroj en biologio estas genoj. La genetika kodo estas tiom antikva, ke ĉiuj vivantaj organismoj uzas ĝin preskaŭ ekzakte sammaniere. Ĝi estas tiom universala fakte, ke biologoj povas preni genon de unu organismo kaj meti ĝin en tute alian organismon sen multaj problemoj. Ankaŭ la studado de genoj estas antikva. Biologoj kiel Charles Darwin kaj Gregor Mendel detale pristudis heredadon longe antaŭ la malkovro de DNA. Hodiaŭ la genetika kodo estas malĉifrita, sed ankoraŭ ne tute komprenata. Kvankam oni povas analizi la genaron de ajna organismo pli rapide ol iam antaŭe, ankoraŭ restas multaj demandoj: Kiuj genoj faras kion kaj kiel oni eĉ eltrovas tion?

En la 19a jarcento, kiam la pli detala studado de genetiko vere komenciĝis, oni sciis preskaŭ nenion pri ĉeloj. Oni jam delonge povis vidi ĉelojn kaj unuĉelajn organismojn per mikroskopoj, sed multaj pli detalaj strukturoj en la ĉelo simple tro etas por kutima mikroskopo. Por la pioniroj de genetiko, ĉeloj estis nigraj skatoloj kies internaj meĥanismoj simple ne povis esti konataj. Malgraŭ tio, oni sukcesis eltrovi sufiĉe multe pri heredado simple per observado. Charles Darwin estas ĉefe konata pro sia vojaĝado, sed hejme li fanatike bredis kolombojn. Tiel li lernis multe pri kiel la trajtoj de la parencoj influas tiujn de la idoj, kaj finfine li povis klarigi kiel oni kreas novajn variaĵojn de kolomboj per selektado. Alia konata genetikisto estis Gregor Mendel, monaĥo kiu eksperimentis per pizoj. Observante kiel malsamaj trajtoj kiel la koloro de la floro, la formo de la pizo kaj la grandeco de la planto estis transdonataj al la idoj, li sukcesis trovi leĝojn, kiuj regas heredadon.



Mikroskopaj observoj el la 17a jarcento, mikso inter unuĉelaj kaj plurĉelaj organismoj

Laŭ la modelo de Mendel, genoj povas havi malsamajn alelojn. Tiuj estas variaĵoj de la sama geno, kiuj kaŭzas malsamajn trajtojn en la organismo. Por ĉiu geno oni havas du alelojn, kies interagoj difinas kiujn trajtojn oni havas. Ofte unu el la aleloj estas dominantaj, kio signifas ke oni nur esprimas la dominantan trajton eĉ se oni havas du malsamajn alelojn. La nedominanta alelo nur esprimiĝas se oni havas du kopiojn de la nedominanta alelo. La trajtoj de la pizoj en la eksperimentoj de Mendel ĉefe herediĝis ĉi tiel. Foje neniu el la aleloj estas dominantaj kaj la ido povas esprimi mikson de la du trajtoj, ekzemple kiam purpura kaj blanka floroj produktas rozkoloran idon. En aliaj kazoj, ambaŭ aleloj estas dominantaj kaj esprimiĝas sendepende kaj samtempe. Tio estas la kazo en la sangotipo AB en homoj. Mendel induktis, per sekvado de la heredado de trajtoj, ke gepatroj hazarde transdonas unu el siaj du aleloj al la ido, tiel ke la infanoj havas po du aleloj. Per kalkuli ĉiujn kombinaĵojn, oni povas fari statistikan prognozon pri la aleloj de la idoj kaj per dominanteco oni povas antaŭvidi kiel la trajtoj esprimiĝas.




Gregor Mendel

Historiemuloj foje ŝatas imagi mondon en kiu Darwin estus leginta la laboron de Mendel, sed iliaj teorioj ja iomete frostas. Kaj Darwin kaj Mendel observis bone kaj diligente, sed iliaj konkludoj estis sufiĉe malsamaj. En la modelo de Mendel, aleloj estas kiel fiksjaj partikloj. Organismo povas havi malsamajn kombinojn de aleloj, sed la aleloj ne ŝanĝiĝas. En la modelo de Darwin, trajtoj iomete varias en ĉiu ido kaj oni povas draste ŝanĝi specion selektante specifajn trajtojn dum multaj generacioj. Certe ekzistis diferencoj inter la du vidpunktoj, sed malgraŭ tio, ili ambaŭ sorbiĝis de la moderna genetiko. Kiel tio eblas?

La partiklo de genetiko

Je la fino de la 19a jarcento kaj la komenco de 20a jarcento, oni malkovris la materialon kiu enhavas la genetikajn informojn: kromosomoj. Eĉ per la plej bonaj lummikroskopoj, oni kutime ne povas vidi kromosomojn, ĉar ili estas uzataj. Nur kiam ĉelo dividiĝas ĝi kompaktigas la kromosomojn por disigi ilin, kaj tiam ili estas sufiĉe densaj por esti videblaj. Kune kun aliaj genetikistoj, Theodor Boveri montris ke kromosomoj sekvas la leĝojn de Mendel kaj ke ili fakte estas la partikloj, kiuj enhavas la genetikajn informojn. Homoj kutime havas 23 parojn. El tiuj paroj, infano ricevas unu kromosomon de la patrino, kaj unu de la patro. Ili enhavas la samajn genojn, sed ne nepre la samajn alelojn. Tiujn oni heredas ekzakte laŭ la leĝoj de Mendel. La sola escepto estas la sekskromosomoj, kiuj en homoj nomiĝas X kaj Y. Y estas tre malgranda kaj surhavas malmulte da genoj. Tio signifas ke homoj kun la kombino XY havas nur unu alelon de la genoj sur la X-kromosomo, kaj ke nedominantaj trajtoj pli ofte esprimiĝas en tiuj homoj.




Kromosomoj liberigitaj el ĉeloj, kiuj rompiĝis dum la dividiĝo

Sciante ke kromosomo surhavas multajn genojn, oni povus konkludi ke tiuj trajtoj devus esti ligitaj. En aliaj vortoj, oni ne heredas malsamajn genojn sendepende, sed ricevas ĉiujn genojn sur la sama kromosomo kune. Oni ne malpravus, ĉar genoj ofte herediĝas kune, sed ne ĉiam. La ĉelo havas meĥanisman, per kiu ĝi povas interŝanĝi partojn de la du kromosomoj en paro antaŭ la kreado de seksa ĉelo. Tiel ĝi miksas la alelojn iomete kaj kreskigas la genetikajn diversecon de la idoj. La interesa parto de tiu meĥanismo estas ke oni povas uzi ĝin por determini la vicordon de la genoj sur la kromosomo. Por ke unu geno iru al la alia kromosomo kaj la alia ne, tranĉo okazas inter ili. Estas multaj lokoj kie oni povas tranĉi kromosomon, do se la genoj estas tuj apude, la probablo ke la tranĉo okazas inter ili estas malgranda.

Tio signifas ke ju pli proksimaj genoj estas sur la kromosomo, des pli ofte ili estas heredataj kune. Se oni kolektas sufiĉe da datumoj, oni povas uzi ilin por kompari la relativajn distancojn inter la genoj kaj finfine krei tutan mapon de la kromosomo.

Konservi informojn en molekuloj

Scienco certe progresis dum la jardekoj kiuj sekvis post la malkovro de kromosomoj, sed oni ankoraŭ ne sciis kiel genetikaj informoj fakte estas konservataj. Tio ŝanĝiĝis ĉirkaŭ la mezo de la jarcento. Oni jam atendis ke la genetikaj informoj estis konservataj en granda molekulo, eble proteino, ĉar grandaj molekuloj estas surprize stabilaj. En 1944, Erwin Schrödinger kreis teorion bazon por subteni tiun supozon. La fiziko malantaŭ lia modelo, kvankam interesa, estas tro detala por ĉi tiu aŭdienco, sed la rezultoj ja estis interesaj. Li enkondukis la koncepton de "neperioda kristalo". Kutimaj kristaloj konsistas el fiksa unuo de kelkaj molekuloj, atomoj aŭ jonoj, kiuj estas ripetataj en ĉiuj direktoj. Tio ne estas bona bazo por konservi informojn, ĉar ripetado estas la malo de informoj.




Regula strukturo de sala kristalo. Se oni fortranĉus duonon, oni ne perdus informojn, ĉar oni povas mem redesejni la reston de la strukturo.

Pensi pri informoj en atomoj kaj molekuloj malfacilas, sed havas sencon. Nekonscie oni tuttempe konservas informojn tiel. Se oni skribas sur papero, la informoj konserviĝas en la pozicio de la molekuloj en la inko, aŭ se oni tajpas blogaŭdienco, la informoj konserviĝas en elektronoj en la komputilo. Kiam temas pri molekuloj, informoj konserviĝas en neantaŭvidebleco. Por kompreni tion, oni devas pripensi kristalon. Se kristalo estas perfekta, ĝi konsistas el nenio krom ripetado de la sama baza unuo. Tio signifas ke oni povas preni kristalon kaj tranĉi ĝin en du duonojn sen perdi informojn. Oni povas simple rekonstrui ĝin per kopii la bazan unuon. Laŭ Schrödinger la genetikaj materialoj devus esti tre granda kiel kristalo, sed ĝi ne povas esti simpla ripetado. Eble ĝi

povus esti kombino de malsamaj bazaj unuoj, kies sinsekvo enhavas la informojn. Oni scias ke tia molekulo ja enhavus multajn informojn, ĉar se oni duonigus ĝin, oni bezonus la informojn de la alia duono por rekonstrui la ĝustan sinsekvon de unuoj.

Jam kelkajn jarojn post la enkonduko de neperiodaj kristaloj, la vera molekula bazo de genetiko estis malkovriĝis: DNA. La molekulo jam estis konata dum longa tempo, sed oni ne ligis ĝin al heredado. Inspirite de la laboro de Schrödinger, Watson kaj Crick publikigis la unuan artikolon, kiu ĝuste priskribas la strukturon de DNA. Ĝi konsistas el du plektitaj fadenoj, kiuj nomiĝas la duopa helico. La individuaj fadenoj estas faritaj el kvar bazaj unuoj, adenino, timino, guanino kaj citozino (ofte mallongigataj kiel A, T, G kaj C). Tiuj unuoj povas aperi en ajna sinsekvo sen multe ŝanĝi la strukturon kaj ĥemiajn trajtojn de la molekulo. Tio igas ilin perfektaj por la konservado de informoj kiel neperioda kristalo. Kvankam Watson kaj Crick ĉiam ricevis, kaj meritis, multe da estimo, oni iĝas pli kaj pli konscia pri la grava rolo de Rosalind Franklin. Ŝi estis bonega eksperimentisto kaj opiniis ke oni ne publikigu teorian modelon kiam oni ankoraŭ ne havas ĉiujn eksperimentajn rezultojn por pruvi ĝin. Eble Watson kaj Crick tro hastis.




Rosalind Franklin

La kodo de DNA

Kiam oni malkovris la strukturon de DNA kaj komencis legi la sinsekvon de la bazoj, oni pensis ke oni trovis la sanktan Gralon. Se oni nur povus malĉifri la genetikan kodon, oni povus legi ĝin kiel manlibron. La vero estis malpli simpla ol atendite.

La genetika kodo estis malĉifrita en la 50aj kaj 60aj jaroj per artefaritaj molekuloj de mesaĝa RNA (mRNA). Tio estas unufadena molekulo kiu similas al DNA, sed uzas la literojn A, U, G kaj C (uracilo anstataŭ timino). En la ĉelo ĝi estas uzata por kopii la informojn en la DNA kaj transporti ilin al la proteinfabrikoj: la ribosomoj. Proteinoj konsistas el faldita fadeno de aminacidoj. Tio signifas ke la mRNA

devas iel enhavi informojn pri la sinsekvo de tiuj aminacidoj. La plej simpla eksperimento kiun oni povas fari por testi tion estas se oni donas al la ribosomo mRNA-molekulon kiu ripetadas la saman literon, ekzemple UUUUU ktp. En ĉi tiu kazo la rezulto estus fadeno kiu konsistas nur el la aminacido fenilalanino. Tio bonas, sed restas granda problemo. La kodo de la mRNA konsistas el kvar malsamaj literoj, dum proteinoj ĝenerale povas enhavi 20 malsamajn aminacidojn. Alie dirite, oni bezonas plurajn literojn por priskribi unu aminacidon, same kiel 28 literoj povas priskribi ĉiun vorton en Esperanto. Duliteraj kombinoj rezultus je 16 malsamaj "vortoj", kio ne sufiĉas. Triliteraj kombinoj rezultas je 64 "vortoj", kio estas pli ol sufiĉe. El la restantaj vortoj, tri estas uzataj kiel haltsignaloj, kiuj indikas la finon de la proteino. La aliaj estas uzataj por la samaj aminoacidoj tiel, ke unu aminacido povas esti ĉifrita en 1, 2 aŭ 4 manieroj. Tio protektas la organismon, ĉar tiel ne ĉiu mutacio povas ŝanĝi la proteion.




Tradukado inter la kvarlitera alfabeto de RNA kaj la 20-litera alfabeto de proteinoj

Per ŝanĝi la mRNA-molekulojn kaj analizi la produktojn, oni finfine sukcesis krei tabelon por la tuta genetika kodo. La bona novaĵo estas ke tiu kodo estas preskaŭ tute universala, kio signifas ke oni teorie povas igi ajnan organismon esprimi genon de ajna alia organismo. La malbona novaĵo estas ke nur la genetika kodo ne sufiĉas por kompreni organismon. La mRNA priskribas la sinsekvon de la aminoacidoj, sed diras nenion pri kiel proteino faldiĝas aŭ kion ĝi faras en la ĉelo. Nuraj genoj ne diras multe.

A circular diagram is separated into three rings, broken down into sections labeled with the letters: G, U, A, and C. Each represents a nucleotide found in RNA. The center ring is divided into four areas marked with a unique letter. The second ring is divided into 16 sections also labeled with a nucleotide. They are organized so that the outer edge of the central letters touches four unique nucleotides. The third outer ring, divided into 64 sections labeled with a nucleotide, repeats this. Amino acids are placed outside of the circular diagram and are in contact with specific nucleotides. Using this diagram, one can connect a sequence of three nucleotides with a specific amino

acid. For example, given "GUC", one can follow contiguous sections of the rings from the center to the outside: from G to U and U to C. This leads the user to the amino acid Alanine.



Tabelo kiu montras la kodojn por la malsamaj aminacidoj

DNA en la laboratorio

Por vere kompreni organismon, oni kombinu tion kion oni scias pri la genoj kun tio kion oni scias pri la proteinoj kaj la ĉelo. Hodiaŭ tiaj eksperimentoj ne plu konsistas nur el observado. Sciencistojn havas aliron al multaj teĥnikoj per kiuj ili povas aktive modifi la organismon kaj vidi kio okazas. Se mi volus priskribi ĉiun metodon kiu estas uzata en modernaj laboratorioj, mi bezonus dikan libron, sed mi povas priskribi kelkajn interesajn ekzemplojn.

Antaŭ la komenco de la pandemio, mi ne povis atendi ke PĈR iam enirus ĉiutagajn konversaciojn, sed nun multaj homoj rekte spertis PĈR-bazitan teston. PĈR, aŭ polimeraza ĉen-reakcio, estas metodo por artefarite kopiadi DNA-molekulon, tiel ke oni akiras detekteblan kvanton de DNA, kiu sufiĉe grandas por aliaj eksperimentoj. Ĝi estas rapida kaj efika metodo, ĉar ĝi okazas ekster la ĉelo. La metodo estas bazita sur temperaturŝanĝoj. Se oni plialtigas la temperaturon, la du fadenoj de DNA-molekulo disfalas. Se oni malaltigas la temperaturon denove, la fadenoj trovas unu la alian denove kaj kunfandiĝas. Se oni sukcesas kopii la fadenojn kiam la temperaturo ankoraŭ estas alta, oni povas simple plialtigi kaj malplialtigi la temperaturon en ciklo. La kvanto de DNA-molekuloj ado duobliĝas, ĝis oni havas milionojn da molekuloj en tre mallonga tempo.



Aparato, kiu cikle ŝanĝas la temperaturon por fari PĈR

La kopiado de DNA okazas per la proteino DNA-polimerazo. Tio estas molekula maŝineteto, kiu povas plilongigi unu fadenon de DNA surbaze de la ŝablono sur la alia fadeno. Se oni kreas etajn pecojn de DNA por la komenco kaj la fino de la geno kiun oni volas kopii, la polimerazo povas kopii la genon inter ili. En 1993 Kary Mullis ricevis la Nobelpremion pri ĥemio por enkonduki tiun procezon. Kvankam li certe ŝanĝis biologion por ĉiam, li estas memorata eĉ pli pro siaj frenezaj opinioj. Li opiniis ke scienco estis koruptita kaj li uzis sian famecon por popularigi kontraŭsciencaĵojn kiel la ideo ke aids ne rezultas de HIV. Mi povus verki tutan blogafiŝon pri la makulegoj sur lia kariero, sed ĉi tio ne estas klaĉgazeto*.

La plej granda problemo de PĈR estis ke la altaj temperaturoj detruas la DNA-polimerazon. Tio estas malŝparo de materialo, sed eĉ pli de tempo kaj laboro. Por fari PĈR reagon, sciencisto devis aldoni novan polimerazon ĉiun ciklon, dum dekoj da cikloj. La solvo venis de bakterio, *Thermus aquaticus*, kiu vivas en varma akvo kaj eltenas temperaturojn ĝis 80°C. Pro ĝia ekstrema vivmedio, ĝi havas adaptitan DNA-polimerazon, kiu povas esti uzata je la altaj temperaturoj necesaj por PĈR. Pro tio ke la tiel nomata Taq DNA-polimerazo ne detruigas ĉiun ciklon, oni povis vere aŭtomatigi PĈR kaj akiri esence senfine multe da DNA. Hodiaŭ la teĥniko estas uzata en ĉiuspecaj laboratorioj. Oni povas uzi ĝin por detekti malgrandajn kvantojn de virusa RNA (se oni unue konvertas ĝin al DNA), sed ĝi estas aplikata ankaŭ en ekologio, paleontologio, polica laboro kaj tiel plu.


*Por la veraj klaĉemuloj, jen anglalingva superrigardo de ĉiuj klaĉoj:

<https://alumni.berkeley.edu/california-magazine/winter-2019/intolerable-genius-berkeleys-most-controversial-nobel-laureate>

Legi DNAn

Oni povas kopii DNAn ĝis oni havas plenan tubeton, sed tio nur estas utila se oni povas legi ĝin. Iam tio estis tre malrapida kaj kosta manlaboro, sed hodiaŭ iu ajn povas sendi sian DNAn al entrepreno por analizado. Kiel tio eblas?

Sekvenado, la legado de DNA-sekvenco, komenciĝis en la sepdekaj jaroj. Dum jardekoj la plej populara metodo estis Sanger-sekvenado, kiu ankoraŭ estas uzata por mallongaj pecoj de DNA. La metodo estas bazita sur dudeksinukleotidoj kiuj fluoreskas. Dudeksinukleotidoj estas molekuloj kiuj povas ligiĝi al DNA nur je unu flanko, kio signifas ke ili ĉesigas la kreskadon de la ĉeno. Se oni kopias DNA-fadenojn kaj aldonas etan kvanton de tia dudeksinukleotido, ili estas enmetitaj hazarde, kreante fadenojn de hazardaj longoj. Tion oni faras aparte por ĉiu bazo (A, T, G kaj C). Se oni poste aranĝas la fadenojn laŭ longo (kio eblas per alia teĥniko, kiun mi ne priskribos ĉi tie), oni povas simple legi la literojn de la komenco ĝis la fino. Poste oni inventis maŝinojn por plifaciligi kaj plirapidigi la procezon, kio kaŭzis gradan malkreskon de la kostoj.



Farbita DNA, ordigita laŭ longo kaj bazo

La metodo de Sanger estas bona se oni interesiĝas pri specifa peco de DNA, ekzemple por detekti mutaciojn, sed ĝi ne estas taŭga por sekvenci la tutan genaron de organismo. Malgraŭ tio, oni ja sukcesis apliki ĝin por kelkaj genaroj. La unuaj sekvencitaj organismoj estis relative simplaj kiel bakterioj, sed ankaŭ sekvis kelkaj eŭkariotoj, malpli simplaj organismoj kies ĉeloj enhavas ĉelkernon kaj organetojn. La unua estis fornogisto (*Saccharomyces cerevisiae*) en 1997, kiu havas 16 kromosomojn kun pli ol 12 milionoj da bazparoj kune. Poste venis *Caenorhabditis elegans* en 1998 kaj *Drosophila melanogaster* en 2000, du bestoj kiuj gravas kiel modelorganismoj. La unua malneto de la homa genaro estis publikigita en 2001. Ĝi venis ne de unu individuo, sed grupo da anonimaj volontuloj, kiuj donacis sian DNA. Kompreneble oni ne povas legi la tutan homan genaron de pli ol 3 miliardoj da bazparoj en unu fojo,

do oni devis esti ruza. Oni dividis la DNA en pecoj de kelkaj centoj da bazparoj kaj sekvencis tiujn, post kio oni kombinis ilin per komputiloj. La rezulto estis malneto pro kelkaj kialoj. Ne ĉiuj homoj samas, do kelkaj partoj de la DNA varias multe, kelkaj partoj estas malfacile kompreneblaj al la komputilo, kaj simple povas okazi eraroj. Dum la sekvintaj jaroj oni ĝisdatigis la malneton.



Saccharomyces cerevisiae




Caenorhabditis elegans



Drosophila melanogaster

foto de *cerevisiae elegans* kaj *melanogaster*

Se oni hodiaŭ pagas 100 eŭrojn al entrepreno por sekvenco de sia DNA, oni ne igas kompatindan ĥemiiston sekvenci ĉiujn viajn 3 miliardojn da bazparoj per Sanger-sekvenado. Oni ne bezonas sekvenci ĉion. Averaĝe nur milono de la bazparoj estas malsama inter du homoj kaj oni scias ĝenerale kie la interesaj variaĵoj troviĝas. Malgraŭ tio restas ankoraŭ sufiĉe da DNA por sekvenci, do por fari tion necesas modernaj teĥnikoj. Tiuj metodoj nomiĝas Next-Generation Sequencing, aŭ la nova generacio de sekvenado. Mi ne povas preparoli ĉiun individuan metodon ĉi tie, sed la ĝenerala principo estas aŭtomatigo kaj paralela sekvenado. Oni povas meti la DNA-fragmentojn en malsamaj tuboj kaj individue sekvi ilin per la komputilo, tiel ke oni esence faras 100 eksperimentojn samtempe. Pli kaj pli rapida kaj efika softvaro poste kombinas ilin kiel puzlerojn ĝis ĝi trovas la tutan genaron. Hodiaŭ oni trovas respondojn al demandoj pri tutaj organismoj anstataŭ individuaj genoj.



Next-generation sequencing: Ĉiu kolorpunkto sur ĉi tiu bildo reprezentas apartan sekvencan eksperimenton.


Sekvi proteinojn

La sekvencado de DNA tute ŝanĝis la mondon de genetica eksperimentado. Al Mendel, aleloj estis nevideblaj kaj nur detekteblis per bredado. Hodiaŭ oni povas analizi ies genojn per nenio pli ol tubeto da salivo. Granda diferenco ekzistas tamen inter la ekzisto de iu alelo kaj ties esprimo. Kiel oni scias ke iu geno fakte iĝas proteino? La solvo naĝas en la oceano.

Proteinoj estas tro malgrandaj por kutimaj mikroskopoj, sed oni povas detekti ilin nerekte. Oni povas uzi ekzemple radioaktivajn aŭ fluoreskajn molekulojn, kiuj interagis kun la proteinoj. Unu el la plej sukcesaj ekzemploj de tio estas la verda fluoreska proteino aŭ GFP (Angle: Green Fluorescent protein). Ĝi malkovriĝis en la meduzo *Aequorea victoria*, kiu produktas bluan lumon kaj uzas GFP por konverti ĝin al verda lumo. Pro tio ke la genetica kodo estas universala, oni povas preni la genon por GFP kaj meti ĝin en kromosomo de tute alia organismo kiel bakterio aŭ insekto senprobleme. Nun GFP estas simpla produkto kiun oni povas fabriki sen meduzoj kaj ĝi estas uzata senĉese en ĉiuspecaj eksperimentoj. Oni



Aequorea victoria



Bakteriaj kolonioj kun malsamaj variaĵoj de GFP


eĉ kreis mutaciintajn versiojn kun aliaj koloroj kiel la ruĝan RFP.

La ĉefa uzo de GFP estas la kontrolado de eksperimentoj. Se oni volas enmeti novan genon en bakterion, oni ne ĉiam scias ĉu oni sukcesas. Oni povas solvi tion per aldoni ankaŭ la genon por GFP. Tiel oni scias ke la fluoreskaj bakterioj enhavas ambaŭ genojn, dum la mallumaj enhavas neniun.

Alia eblo estas la sekvado de proteinoj. Se oni engluas la genon por GFP tuj apud alian genon, oni povas krei hibridan proteinion. Tiajn proteinojn oni povas sekvi en la ĉela per kutima mikroskopo, ĉar oni povas detekti la lumon. Ĉi tiaj eksperimentoj estas gravaj kiam oni volas scii ĉu iu proteino troviĝas ĉefe en la membrano, la nukleo aŭ alia loko en la ĉelo kaj kiel ĝi transportiĝas. Oni estus zorgema tamen, ĉar la

aldono de la GFP ne rajtas malhelpi la funkciadon de la ĉefa proteino.

Oni povas sekvi proteinojn ne nur en la ĉelo, sed ankaŭ inter malsamaj ĉeloj. En plurĉelaj organismoj, malsamaj ĉeloj havas malsamajn taskojn kaj fabrikas nur la necesajn proteinojn. Per fluoresko oni povas montri ekzakte kiujn ĉelojn en la korpo esprimas iun genon, specife se la organismo estas travidebla (kiel ekzemple ranido). Pere de tiu metodo, oni povas sekvi kiel specifaj genoj ŝaltiĝas kaj malŝaltiĝas dum la disvolviĝo de besta embrio. Mi povus verki tutan blogartikolon pri tiu temo tamen, do ĉi tiun temon mi konservas por alia fojo.



Drosophila embrio en kiu GFP montras ke genoj esprimiĝas nur en specifaj lokoj

Kaj kio pri la estonteco?

Dum la kolektado de ĉi tiuj informoj iĝis klare al mi, ke la historio de genetiko estas ekstreme riĉa. Unu artikolo neniel sufiĉas por mencii ĉiujn gravajn paŝojn kaj honorojn ĉiujn sciencistojn, bestojn, plantojn kaj bakteriojn, kiuj kontribuis al ĉi tiu bela kampo. Mi ne povas imagi mondon sen PĈR kaj eĉ malpli mondon en kiu oni ne sciis pri la ekzisto de DNA. Nun la granda demando estas kiel la mondo aspektos post 10, 50 aŭ 100 jaroj. Mi povas esti nur optimisma. Vidante kiel Next-Generation Sequencing disvastiĝis dum mia vivo kaj CRISPR/Cas9 dum la lastaj kelkaj jaroj (kio rezultis je la lastjara nobelpremio pri ĥemio por Emmanuelle Charpentier kaj Jennifer Doudna). Eble ni iam kreos tutan ĉelon en laboratorio.

Frank Van Hertrooij el Nederlando

Fonto: <https://scivolemo.wordpress.com/2021/03/31/1408/>

Laŭra tremante paŝis en la ĉambron. Morgan, ŝia edzo, refoje sidis ĉetable, li adresis kovertojn.

– En kiu infera loko vi estis? - kriegis la viro kun taŭzita mieno, kaj kiam la virino paŝis pli proksimen, per la pretigita lambastono li surbatis ŝian piedon. Laŭra ekkriis pro la doloro. Morgan plezureme ekrikanis.

- Alian fojon tuj venu, alvokite! Portu ilin ĉiujn en la poŝtejon, poste revenu! Kaj kunportu al mi poŝtmarkojn, ĉar ili elĉerpiĝis!

De dekdu jaroj ili vivis kune. Laŭra, la movhandikapita orfino iam pensis, ke ŝi amas Morganon. Pri ŝia edzo nur poste malkaŝiĝis: li bezonis servistinojn, ja neniu komencis interparolon kun li. Ĉiuj krom Laŭra konis lian perforteman naturon, ja antaŭ nelonge ŝi venis en la urbon. Morgan ne laboras eĉ nun. Li skribadas taglonge almozpetajn leterojn, kaj eksendinte ilin li atendas respondojn. Je ĉiu dudeka iu nekonato sendas al li kelkajn dolarojn. Ili vivtenas sin per ili, ĉar Laŭra ne povas labori. Ŝi devas hejme saltadi ĉirkaŭ la monstrulo.

Dio, se nur mi povus liberiĝi de li! - ŝi pensis, intertempe ŝi lampaŝe proksimiĝis al la poŝtejo. Ŝi ekvidis skatolon de nova plantprotektenco apud kelkaj ĝardenkultiviloj en iu montrofenestro. Al Laŭra estis okulfrapaj nur nigra kranio kaj kelkaj vortoj: "Atenton, mortodanĝero, veneno!" Veneno...! Eĉ sekiĝis la buŝo al ŝi. Ĉu veneno?

En la poŝtoficejo ŝi eksendis la leterojn, ŝi aĉetis folion da poŝtmarkoj. Antaŭ la florvendejo ŝi malrapidiĝis. Kia estas tiu veneno? Ŝi eksciis. La komizo atentigis ŝin: "Atentu, sinjorino, ĝi neniel trafu la okulojn, nazon aŭ langon. Post ĝia uzado lavu bone viajn manojn per abunda akvo... Ĝi ne trafu la okulojn... langon..." Laŭra vidis Morganon antaŭ si glui sur kovertojn poŝtmarkojn lekinte ilin. Tion li mem faris ĉiam, kun ia plezuro kaj superstiĉo: se li mem pretigas la leterojn, eble pli multaj donacos...

Laŭra hejmeniris. Morgan televidis. La virino iris en la kelon. La likvaĵo de la malgranda aspergoflakono estis tre densa, ĝi malfacile verŝiĝis el la flakono. Sed poste, per peniketo ŝi ŝmiris ĝin sur la dorsflankon de la poŝtmarkoj. La likvaĵo ne havis koloron, nek odoron. "Tiel estas bone" - pensis Laŭra, malgraŭ tio ke ŝia koro preskaŭ elsaltis. Morgan endormiĝis antaŭ la televidilo. Laŭra ŝtele metis la poŝtmarkojn apud la staketon de leterfolioj kaj kovertojn.

- En kiu infera loko vi estis? - alkriis morne Morgan revekiĝinte, kaj li etendis la manon al la kovertoj. Laŭra ekŝrike eskapis, sed iu bato lia eĉ tiel ŝin trafis. Ĝi doloris ŝin.

Matene, Morgan skribis novajn leterojn: "... Estimata sinjoro! Ekstreme malesperiĝinta viro skribas al Vi. Nur unu paŝo mankas al mi ĝis memmortigo..." Laŭra staris en la kuirejo. La forno estis malvarma. Hodiaŭ ŝi ne kuiras tagmezmanĝon. Por kio ja...? Ŝi spione enrigardis tra la serurtruo. Morgan estis ĝuste lekanta poŝtmarkojn. Ĉu kvin, dek..., dudek? Li mutle laboris hodiaŭ, li skribis multajn leterojn.

- Laŭra! - li kriis obtuzvoĉe. La virino ne ekmovis sin. En la ĉambro io brue puffalis. Ĉu Morgan? Laŭra atendis ankoraŭ. Lia stertorvoĉo retransviligis ŝin. Nenio kompata estis en ŝi. Nur post longe ŝi eniris. La restaĵon de la veneno ŝi enterigis en la ĝardeno. De nun nur la poŝtmarkoj atestus kontraŭ ŝi... Morgan kuis surplanke, li estis senmova. Laŭra piedbate forigis la lambastonon malproksimen, poste ŝi kapte levis la leterojn kun poŝtmarkoj. Ŝi kalkulis ilin - estis dek sep. Dek sep pecoj de morto... Ŝi rapidis al la poŝtejo. Poste ŝi nur malrapidis hejmen. Tuj vesperiĝos. Je la dek-naŭa oni forportos la leterojn el la poŝtejo. Ŝi alarmos kuraciston aŭ la policon nur post la dudeka. Kaj tiam restos neniu spuro de tio, kiel la veneno trafis la organismon de Morgan. Tion, ke li mem ŝatis leki la poŝtmarkojn antaŭ ol glui ilin surkovrile, sciis nur Laŭra, ne alia.

rakonto de **István Nemere** el Hungario
tradukis Tibor PAPP el Hungario

fonto: **Debrecena Bulteno** #118, majo 2000



Solvo de la krucvortenigmo

S	A	B	O	T	I		A	L	I	E	L
A	T	A	K	O		T	R	A	N	Ĉ	O
R	E	T	O		V	I	E	N	O		N
A	N	O		L	I	A	N	O		O	D
J	O		L	I	B	R	O		A	V	O
E		P	E	T	R	O		O	P	A	N
V	A	L	O	R	O		O	K	U	L	O
O	D	I	N	O		P	L	A	D	O	N

Stranga hazardo

Zdenek Myslivec, Bozkov, Ĉeĥio

Tio okazis baldaŭ post la malfermo de la fera kurteno. En tiu tempo ni ĉiuj strebis tuj viziti la landojn, pri kiuj ni povis nur sonĝi. Kadre de niaj modestaj financaj ebloj ni ekvojaĝis per fabrika aŭtobuso al Parizo. Post tri tagoj ni revenis hejmen plenaj de impresoj, kiuj al ni sufiĉus por rakonti ĝis la fino de la vivo. Al iuj mankis monujoj, kiuj restis ĉe poŝtoŝtelistoj ie proksime de Moulin Rouge. La ŝtelistoj laboris teame, senerare. Iliaj metodoj meritis apartan, edukan artikolon.

Ni revenis per alia vojo. Tamen ni jam ne tiom gapis la pejzaĝon, urbojn, vilaĝojn kiel ni komence faris. Regis etoso simila al ordinara ekskurso. Oni rigardis la aĉetitajn donacetojn, parolis pri impresoj kaj multaj vojaĝantoj dormetis, ĝis la momento, kiam iu ekvidis ŝildon kun la sciigo, ke ni proksimiĝas al Verdun. La vorto Verdun estis nekonata al proksimume unu triono de ekskursantoj – al la junularo. Sed al ni, pli frue naskitaj, Verdun estis intime konata el la rakontado de niaj onkloj kaj avoj, rakontado pri la kruela batalkampoj de la unua monda milito. Ni sentis, ke ni ne povas preterveturi, ni devas almenaŭ por momento halti. Pro tio ni petis la ŝoforon. La ŝoforo rifuzis, tute ne emis. Li estis nia bona kamarado, malgraŭe tion li ne volis.

La ŝildoj ĉe la ŝoseo montris kilometrojn al Verdun. Ni estis obstinaj kaj petis denove kaj denove por halto. Ni bedaŭris perdi la eblon vidi la batalkampon. Tamen ŝoforo estis same obstina kaj dum lastaj kilometroj disvastiĝis malkontenta silento en la buso. Ni ĉiuj pensis same: „Neeble, io devas okazi!“ Ŝajnis, ke kvazaŭ temas pri preĝo: komuna deziro de homa grupo pri la sama celo. Eble ne pasis minuto, la aŭtobuso sen klara kialo subite malrapidiĝis kaj tondris bruoj. La vojaĝantoj sur la malantaŭaj sidiloj time eksaltis. Unu pneŭmatiko de aŭtobuso disrompiĝis. La buso malrapide moviĝis proksimume 50 metrojn al la apudo de la ŝoseo, kie estis la lasta eblo viziti batalkampon. Subite ni havis horetan por rigardo.

Ni vizitis nek tombejon, nek monumenton. Tiom da tempo ni ne havis. Ni venis nur proksime. Sed ni vidis kelkajn fortikaĵojn kaj grundon disbatitan de obusaj eksplodoj, restaĵojn de kanonoj tiel, kiel oni

dispecigis ilin kune kun la korpoj de la soldatoj, kiuj estis per la sekvaj eksplodoj tuj entombigitaj. Nun tiun teruran lokon kovras densa arbustaro.

Reen ni iris tra novkonstruita vojo, kiu najbaras la batalkampon kaj tie mi rimarkis objekton, kiun verŝajne elfosis el la tero maŝino dum la konstruo de la vojo. Oni povis vidi, ke temas pri leda soldata boto kun fera hufeto sur la kalkanumo, preskaŭ disfala. El boto montriĝis frakasita tibia ostoj. Tiu kruro estis pli frapa rememoraĵo ol monumento de amasaj murdoj. Mia patro, kiam li foriris al la aŭstria armeo estis dek-ses-jara. La patro estis dufoje vundita kaj en la korpo li havis pecojn de obuso. Kuracistoj konstatis operacion por eligi la fragmentojn danĝera. Tiuj ĉi fragmentoj pli poste kaŭzis evidente lian morton en lia trideksepajaro. Li mortis pli frue, ol ke mi povus konatiĝi kun li. Nur nun, dum mia maljuneco mi povas taksi, kiom multe mi perdis. Per mia tuta animo mi malamas kaj malbenas la respondeculojn de homaj buĉejoj.

Ĉu animoj de la murditaj malfeliĉuloj kaŭzis, ke nia deziro efektiviĝis per tiu stranga maniero?

Aŭtuno 2002

El ina vidpunkto gaje

Edzino riparas la fumŝakton sur tegmento kaj la edzo spektas en la ĉambro sportan televidan elsendon. La edzino vokas al li: „Se mi falus, dum matĉa paŭzo voku la savtaĉmenton.“

„Karulo, riparu la akvan kranon en la kuirejo. La ŝraŭbturnilo kaj plua ilaro estas en la dua tirkesto, en la unua estas plastro kaj tondilo. La tirkestoj estas en la granda ŝranko dekstre de la pordo.“

Fonto: Legolibreto 2 de Jindřiška Drahotova



SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI

 RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO
 Eldonanto : Turka esperantistaro
 Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds